

# UNESKO Kuriiero

Aprilo-Junio 2022

## TRADUKADO: De unu mondo al alia

- En **Meksiko**, per desegnaĵoj oni tradukas vortojn
- Donkiĥoto: De la **kastilia** al la **mandarena** kaj reen
- **Alportante** afrikan sciencon en la vortaron
- Ĉu tradukistoj bezonas simili la aŭtorojn, kiujn ili tradukas?

### NIA GASTO

Joanne McNeil, usona verkistino:  
"Interreto ne estas limigita de tio,  
kion teknologiaj kompanioj faris el ĝi"

ISSN 2096-9082



中国 EL POPOLA  
新闻 CĈINIO  
www.espero.com.cn

9 772096 908225



## Abonu la presitan version

1 jaro (4 numeroj) : 27€ 2 jaroj (8 numeroj) : 54€

Afranko: 9 eŭroj (1 numero)

1 **Membro de UEA**, bonvolu pagi al nia konto ĉe UEA (celi-p)  
2 **Se vi ne estas membro de UEA**, bonvolu pagi 66 svisajn frankojn jare aŭ 132 svisajn frankojn por du jaroj al jena konto:  
PostFinance, Nomo: LIU JUN,  
IBAN: CH98 0900 0000 3048 76172  
Post via ĝirado, bonvolu informi min ĉe lamondo@163.com

<http://www.espero.com.cn/>; <http://esperanto.china.org.cn/>;  
<https://en.unesco.org/courier/subscribe>

## Abonu la bitversion



**Ĝi estas  
100%  
SEN PAGA**



## Sekvu la lastajn novaĵojn de *Kuriero* @unescocourier



Facebook



Twitter



Instagram



## Legu kaj disvastigu

Disvastigu kaj reklamu  
*UNESKO-Kurieron* laŭ Libera Aliro  
(Open Access), laŭ reguloj de UNESKO  
por publikaĵoj.

### 2022 • n-ro 2 • Eldonata ekde 1948

*UNESKO-Kuriero* estas eldonata kvarfoje jare, de la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj pri Edukado, Scienco kaj Kulturo (UNESKO). Ĝi antaŭenigas la idealojn de UNESKO, diskonigante ideojn pri interacie gravaj temoj, konforme al sia mandato.

**Direktoro:** Matthieu Guével

**Ĉefredaktoro:** Agnès Bardón

**Asista redaktoro:** Katerina Markelova

**Sekcia redaktoro:** Chen Xiaorong

#### REDAKTOROJ PRI LINGVOJ:

**Angla:** Linda Klaassen

**Araba:** Fathi Ben Haj Yahia

**Ĉina:** Li Yihong kaj Ĉina Tradukejo kaj Eldonejo

**Franca:** Christine Herme, provlegado

**Hispana:** Laura Berdejo

**Rusa:** Marina Yartseva

**Cifereca redaktoro:** Mila Ibrahimova

**Fotoj kaj ilustraĵoj:** Danica Bijeljac

**Kunordigado pri traduko kaj enpaĝiga:**

Marie-Thérèse Vidiani

**Administracia kaj redakcia asistanto:**

Carolina Rollán Ortega

#### Produktado kaj antaŭenigo:

Ian Denison, Estro pri publikigado kaj varmarkada antaŭenigo de UNESKO

Eric Frogé, Ĉefa asistanto produktada

**Cifereca redaktoro:** Denis Pitzalis,

Reteja arĥitekto/projektanto

Chakir Piro, Reteja Administranto

**Amaskomunikilaraj Rilatoj:** Laëtitia

Kaci

**Fasonado:** Jacqueline Gensollen-Bloch

**Kovrila bildo:** © Agnieszka

Ziemiszewska

**Internuloj:**

He Kexing (Ĉinio)

**Kuneldonaj redaktoroj**

**Esperanto:** Chen Ji

**Kataluna:** Jean-Michel Armengol

**Korea:** Soon Mi Kim

**Informo kaj Kopirajtoj:**

[courier@unesco.org](mailto:courier@unesco.org)

7, place de Fontenoy,

75352 Paris 07 SP, France

© UNESKO 2022



#### Danke al la grandanima apogo de Ĉina Popola Respubliko

Periodaĵo, alirebla en Libera Aliro (Open Access) sub la licenco Attribution ShareAlike 3.0 IGO (CC BY SA3.0 IGO) (<http://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/igo/>). Uzante la enhavon de ĉi tiu eldonaĵo, la uzantoj devas observi la priuzajn kondiĉojn de UNESKO-Deponejo de Libera Aliro (Open Access Repository) (<http://en.unesco.org/open-access/>). La supra licenco koncernas ekskluzive la tekstojn. Por uzi la bildojn, oni devas peti permeson. La indikoj, uzitaj en tiu ĉi eldonaĵo, kaj la prezento de la donitaĵoj ne implicas esprimon de ia ajn opinio de fanke de iu ajn lando de UNESKO koncerne la legan staton de iu ajn lando, teritorio, urbo aŭsfero de ties regado aŭkoncerne markadon de landlimoj. La artikoloj esprimas la opiniojn de la aŭtoroj, ne nepre reprezentas la opiniojn de UNESKO, kiu ne respondecas pri ili.

**Malgarantio:** UNESKO ne garantias la konformon de la Esperanto-eldonaĵo al la originala numero en la ses oficialaj lingvoj de la Organizaĵo.

**La bitversio haveblas senpage ĉe**  
<http://www.espero.com.cn/>  
<http://esperanto.china.org.cn/>

[http://uea.org/revuoj/unesko\\_kuriero](http://uea.org/revuoj/unesko_kuriero)

**Supera organizo:** Ĉina Internacia Komunikada Grupo (CICG)

**Subtena organizo:** Universala Esperanto-Asocio

**Eldono:** El Popola Ĉinio

**Prezidanto:** Chen Wenge

**Ĉefredaktoroj:** Wang Zhongyi, Zhao Jun

**Vicprezidantoj:** Wang Hanping,

Wang Wei, Yu Wen

**Ĝenerala administristo:** Zhao Quanyong

**Aganta ĉefredaktoro:** Chen Ji

**Tradukantaro:** El Popola Ĉinio kaj

UEA-Teamo

**Provlegantoj:** Chen Ji, Mao Zifu, Rafael

Henrique Zerbetto, Rob Moerbeek kaj

José Antonio del Barrio

Presita de Limigita Kompanio Yincheng-

Beichuang en Pekino

**Adr:** P.O. Kesto 77, Beijing CN-100037,

Ĉinio

**Tel:** +86-10-68996130

+86-10-68996590

**Retpoŝto:** lamondo@163.com

CN 10 - 1711/C ISSN 2096 - 9082

**Prezo:** 6.8 eŭroj

# Enhavo

4

## LARĜA ANGULO

### Tradukado: De unu mondo al alia

**Parto de nia komuna humaneco** ..... 4  
Nicolas Froeliger

**Ĉu tradukistoj bezonas simili la aŭtorojn, kiujn ili tradukas?** ..... 8  
Lori Saint-Martin

**En Meksiko, per desegnaĵoj oni tradukas vortojn** ..... 10  
Daliri Oropeza

**“Ni devas rezisti la tutmondigon de lingvoj”** ..... 13  
Intervjuo kun Barbara Cassin

**Donkiĥoto: De la kastilia al la ĉina kaj reen** ..... 15  
Xin Hongjuan

**Humuro: Vera enigmo por tradukistoj** ..... 17  
Marina Ilari

**“Ĉe Unuiĝintaj Nacioj, lingvo ne estu baro”** ..... 19  
Intervjuo kun Lama Azab

**Alportante afrikan sciencon en la vortaron** ..... 20  
Nick Dall

**Subtekstado: Malantaŭ la scenoj** ..... 22  
Roshanak Taghavi

**La tradukisto, ĉu endanĝerigita specio?** ..... 24  
Joss Moorkens

26

## ZOMO

**Koralrifoj: Kroniko de fragila mondo** ..... 26  
Fotoj: Alexis Rosenfeld

39

## IDEOJ

**Diru al mi kion vi manĝas kaj mi diros al vi kiu vi estas** ..... 39  
Gustavo Laborde

42

## NIA GASTO

**“Interreto ne estas limigita de tio, kion teknologiaj kompanioj faris el ĝi”** ..... 42  
Intervjuo kun Joanne McNeil

46

## PLI DETALE

**Subtera akvo: Ĉu antidoto por la krizo de akvo?** ..... 46

## Ĉefartikolo

“Temas pri diro de preskaŭ la samo”, laŭ vortoj de la itala verkisto Umberto Eco. Estas tuta mondo en ĉi tiu “preskaŭ”. Traduki estas alfronti la alion, la malsamon, la nekonataĵon. Ĉi tio ofte estas la esenca antaŭkondiĉo por ĉiu, kiu volas aliri universalan, multoblan, diversan kulturon. Ne estas do hazarde, ke la Ligo de Nacioj okupiĝis pri la afero en la 1930-aj jaroj, kaj iniciatis la kreadon de *Indekso de Tradukaĵoj* (Index Translationum).

Ĝi estis poste transprenita de UNESKO en 1948, kaj tio ebligis la unuan listigon de verkoj tradukitaj en la mondo. Lanĉita du jarojn poste, la programo Reprezentaj Verkoj estis dediĉita al tradukado de ĉefverkoj de la monda literaturo. La nuntempa subteno de UNESKO al la publikigo de leksikono de vortoj el la indiĝenaj lingvoj de Meksiko, kiuj ne estas tradukeblaj en la hispanan, estas daŭrigo de ĉi tiuj klopodoj.

Kvankam ilia malapero estis antaŭvidita jam en la 1950-aj jaroj, tradukistoj – kiuj pli ofte estas tradukistinoj – neniam estis tiom multnombraj kiel nun. La maŝinoj evoluigitaj post la milito ne venkis ĉi tiun ombro-profesion. Nek sukcesis tion fari la ciferecaj tradukiloj, kiuj fariĝis kutimaj en niaj tutmondigitaj interparoloj, eĉ se ili helpis ŝanĝi la profesion.

Fakte lingvo ne estas nur komunikilo. Ĝi estas tio kaj multe pli. Ĝi estas tio, kion faras el ĝi la verkoj, skribitaj aŭ parolaj, kiuj kontribuas por forĝi en ĝi ion, kion oni foje nomas la genio de la lingvo, kiun la plej efikaj traduk-programoj ne kapablas rekrei.

Ĉar tradukado estas pridubado pri la nepensitaĵoj de la lingvo, alfronti ĝiajn plursencaĵojn, lumigi la riĉecon, la diferencojn kaj la signifo-niveleojn, kiuj malkaŝiĝas en la transiro de unu lingvo al alia. Tio signifas ankaŭ, per tiu ĉi interrilato kun la aliaj, pridubi la proprajn lingvon, kulturon, sin mem. Necesas do konservi la vigelecon de la plurlingveco, por ke ĉiu povu paroli kaj pensi en sia propra lingvo. Jen la kerna signifo de la Internacia Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj (2022-2032), kiu atentigas pri la kriza situacio de multaj lingvoj, minacataj de formorto.

En epoko karakterizita de la serĉado de identeco, tradukado restas neanstataŭigebla kuracilo kontraŭ memizoliĝo. Ĉar sen ĝi, kiel skribis la franc-usona aŭtoro George Steiner, “ni vivus en provincoj ĉirkaŭataj de silento.”

Agnès Bardón

-El la angla esperantigis Renato Corsetti (Italio)

# Tradukado: De unu mondo al alia

Ĝi estas nebone konata mondo, kiu ne estas limigita al sia literatura dimensio: tradukado estas ilo por progresigi lingvojn, diskreta parto de la ekonomio kaj veturilo por ideoj, sed ĝi estas ankaŭ spaco transformiĝanta, skuata de la progresoj de artefarita intelekto. Ĝi estas ankaŭ, ŝajne super ĉio, rimedo por ke ĉiu civilizacio havu aliron al la alia.

▼ *La Turo de Babelo*, pentrita de usona artisto *Josh Dorman*, 2008.







© Josh Dorman / kun afabla permeso de la artisto kaj la Galerio Ryan Lee, Nov-Jorko

## Nicolas Froeliger

Eksa profesia tradukisto. Nicolas Froeliger nun estas profesoro ĉe la Universitato de Parizo, specialisto pri pragmata tradukado.

**Ĝ**i estas ĉie estanta kaj ĉiam diskreta. Ni ĉiuj havas ideon pri tio kio ĝi estas, sed neniam la saman. Ĝi reprezentas universalan homan kapablon (komprenado signifas tradukadon, skribis la franc-usona verkisto, lingvisto kaj kritikisto George Steiner), kaj ĝi ebligas tre specialajn kapablojn – tradukado ŝajnas esti nenio ol paradoksoj. Do, ne estas surprize, ke dum jarcentoj, oni preferis la uzadon de metaforaj esprimoj, ofte degradaj, por provi priskribi ĝin per parafradoj: tradukado kiel “nefidela belulino”, “servistino”, “la dorsa flanko de brodaĵo”... tradukisto kiel “kontrabandisto”, “metiisto”, “kopiisto”, kaj kelkfoje kiel “trompanto” aŭ “enketisto”...

Kutime ĝi estas ankaŭ ejo por antaŭjuĝaj ideoj: “tradukado estas neebla”; “helpe de vortaro ĉiu kapablas traduki”; “tradukado estas lingva afero”; “ne eblas vivteni sin per traduka laboro”; “tradukita teksto nepre estas malpli altnivela ol la originalaĵo”; “aŭtomata tradukado estontece anstataŭos profesiajn tradukistojn”... Tiuj asertoj estas malveraj, aŭ almenaŭ pridubindaj, sed klarigaj.

Pro tio, indas iom da klarigo pri ĝi. Ni rememoru, ke tradukado estas samtempe operacio kaj la rezulto de ĉi tiu operacio, sen perfekta kongruo inter ambaŭ. Multaj tradukoj estas farataj de neprofesiaj tradukantoj, kaj profesiaj tradukistoj ofte faras multe pli ol nur traduki. Krome, tradukistoj ofte estas inaj: pli precize, tri kvaronoj el ili.



“  
**Tradukado estas  
antaŭ ĉio necesajo  
por la kulturo**



## Diri preskaŭ la samon

Tradukado ankaŭ alvokas multajn difinojn: de “diri preskaŭ la samon” (titolo de libro pri tradukado de la itala semiotikisto kaj aŭtoro Umberto Eco) ĝis “diri alion en alia maniero” (laŭ esprimo de la franca lingvisto kaj antropologo Jean Gagnepain); de aktiveco, kiu antaŭkondiĉas scion de lingvoj ĝis ilo por instrui ĝuste tiujn lingvojn.

Oni tradukas estetikan emocion, mesaĝon, signifon, intencon... La scienca mondo ne estas escepto. Kelkaj konsideras tradukadon kiel studobjekton – ilin oni nomas ‘tradukologoj’. Aliaj uzas tradukadon kiel ilon por servi al la literaturo, komparante aŭ alimaniere, por lingvosciencoj, filozofio, psikoanalizo,

feministaj aŭ postkoloniaj studoj... Ĉiukaze, la plej grava vorto estas: interfakeco.

Facile oni povus sin perdi en la senfineco de specialaĵoj de ĉi vasta universo. Pli bone estus skizi kelkajn defiojn en tempo, kiam ĉi aktiveco, ĉi profesio, ĉi operacio, same kiel multaj aliaj, estas skuataj de la progresoj de artefarita intelekto.

Tradukado estas antaŭ ĉio necesaĵo por kulturo: Per ĝi ĉiu civilizacio konscias pri si mem kaj navigas al si aliron al la alia. Ĉi tio estas la plej malnova branĉo de tradukado, kaj pro tio, ankoraŭ nuntempe la plej laŭdata. Ĝi estas historia arko, kiu etendiĝas de la plej antikva jura tradukaĵo de ni konata, el 1271 antaŭ Kristo (packontrakto inter la hititoj kaj la antikvaj

egiptoj), trairas sinsekvajn tradukojn de la Biblio kaj aliaj gravaj religiaj tekstoj – de la Septuaginto (la unua traduko de la hebrea Biblio en la grekan en Aleksandrio en la tria jarcento antaŭ Kristo) ĝis la nuntempo – kiam ĝi estas uzata en la literatura kampo. Tio permesas al ĉiuj la aliron al majstroverkoj kaj aliaj verkoj, kaj nuntempe ankaŭ aŭdvidaj kreaĵoj de la homaro, en sia propra lingvo, trans la diferencoj, kiuj kaŭzas ĉe kelkaj homoj la impreson, ke povus ekzisti tekstoj aŭ konceptoj netradukeblaj. La ĉi-lastaj estas por ĉiam retradukendaj, opinias la franca filozofo kaj tradukologo Barbara Cassin.



**La tradukado estas esenca parto de tio, kio formas nian komunan humanecon**

## Permesi vojaĝadon de ideoj

Kadre de civitaneco kaj publika politiko, tradukado estas esenca ilo de perado kaj subteno de naciaj kaj aliaj lingvoj. Ĝi donas bonvenan kontraŭpezon al stulteco, malamo kaj perforto, eĉ se oni uzas ĝin en armeaj servoj. Per tradukado ideoj povas vojaĝi. Pro la pludaŭro kaj evoluo de migrado, pli kaj pli da landoj konsideras ĝin kiel fundamentan rajton por atingi la alireblon al publikaj servoj (sanitara servo, justico, leĝaro, ktp.) en lingvo, kiun oni scipovas.

Tradukado estas ankaŭ esenca, kvankam diskreta, parto de la ekonomio. Ĝi estas profesio en granda ŝanĝiĝo, regroupigante pli kaj pli specialigitajn profesiojn: tradukado kaj interpretado, laŭ tradicia signifo, sed ankaŭ lokalizado, terminologio, reviziado, post-redaktado, projekt-mastrumado, teknika redaktado, ktp. – ĉi ĉiuj ariĝas sub la ĝenerala termino “pragmata tradukado”, en la signifo de celo antaŭ ĉio al komunikado

## Kio estas *Indekso de Tradukaĵoj*?

Kion komunan havas la dana aŭtoro de rakontoj Hans Christian Andersen, la brita aŭtorino de romanoj Agatha Christie kaj Carlo Collodi, la “patro” de Pinocchio? Ili apartenas al la listo de la plej ofte tradukitaj aŭtoroj tutmonde laŭ *Indekso de Tradukaĵoj* de UNESKO, unika bibliografia datumaro, kiu listigas verkojn tradukitajn tutmonde.

La *Indekso* estis kreita en 1932 de Internacia Instituto pri Intelektua Kunlaboro de Ligo de Nacioj, kaj adoptita de UNESKO en 1948. Do ĝi estas pli malnova ol la organizo mem, kaj unu el la plej fruaj programoj de UNESKO. La *Indekso* naskiĝis el la konvinko, ke “tradukado estas valora forto por interkompreno inter malsamaj popoloj”; ĝi ebligas superrigardon pri la cirkulado de ideoj. Dank’ al la *Indekso*, ni scias, ke la lingvoj plej ofte tradukitaj estas, laŭ vicordo: la angla, la franca, la germana, la rusa, la itala kaj la hispana.

Ĝis kiam la *Indekso* estis ĉesigita pro financaj kialoj en 2013, bibliografiaj centroj aŭ naciaj bibliotekoj de partoprenintaj landoj sendis ĉiujare al UNESKO biografiajn datenojn pri tradukitaj libroj en ĉiuj kampoj de sciado. En 2013 ĝi konsistis el pli ol kvar milionoj da enregistraĵoj – 2,2 milionoj el ili estas ciferecigitaj – tio koncernas tradukojn el aŭ al 1139 malsamaj lingvoj. Ĝi reprezentas verkojn de pli ol 500 mil verkistoj, tradukitaj de ĉirkaŭ 600 mil tradukistoj, tiel ĝi estas unu el la plej grandaj datenaroj de la organizo. Ankoraŭ hodiaŭ, spite al sia haltigo, ĝi estas konsiderata kiel referenca fonto de informoj pri tradukitaj libroj.

**-El la franca esperantigis Frank Lappe (Germanio)**

## La aŭtoroj plej multe tradukitaj\*

**Agatha Christie** (1890-1976) Angla romanverkistino • **7 236 tradukoj**

**Jules Verne** (1828-1905) Franca aŭtoro • **4 751 tradukoj**

**William Shakespeare** (1564-1616) Angla dramverkisto • **4 296 tradukoj**

**Enid Blyton** (1897-1968) Angla verkistino • **3 924 tradukoj**

**Barbara Cartland** (1901-2000) Angla aŭtorino • **3 652 tradukoj**

**Danielle Steel** (naskita en 1947) Usona aŭtorino • **3 628 tradukoj**

**Vladimir Lenin** (1870-1924) Rusa politikisto • **3 593 tradukoj**

**Hans Christian Andersen** (1805-1875) Dana fabela aŭtoro • **3 520 tradukoj**

**Stephen King** (naskita en 1947) Usona aŭtoro • **3 357 tradukoj**

\*Kvanto de tradukitaj verkoj (inkludas reeldonaĵojn) en malsamaj lingvoj dum periodo de ĉ. 30 jaroj (1980-2009/2010).  
Fonto: *Index Translationum* de UNESKO

(tekstoj teknikaj, sciencaj, juraj, informaj, ekonomiaj, financaj, k.a.). Je tutmonda skalo, tio inkludas kelkajn centmilojn da personoj, kun spezo de pli ol 50 miliardoj da usonaj dolaroj.

Supraĵa pririgardo al ĉi tiuj aspektoj povus konduki al kontraŭo inter tiuj aspektoj aŭ al prefero de unu aŭ alia. Tio estus metoda eraro: Socialaj aspektoj ne kontraŭstaras al kulturaj, aŭtomatigo ne kondamnas la profesiulojn – tradukado ne povas prosperi sen ili. La nunaj evoluoj devigas nin aktualigi niajn ideojn pri tradukado, pri tiuj, kiuj ĝin praktikas kaj pri ĝia loko en la socio. La disponigo de senpagaj aŭtomataj tradukiloj al preskaŭ ĉiuj igas ĝin, spite kelkajn neperfektaĵojn, bona komuna propraĵo. Ĝi ne anstataŭos profesiajn tradukistojn, ĉar aŭtomata

tradukado ne entenas la amplekson de komunikado nek la kapablon de la homaj lingvoj krei ion novan el io jam ekzistanta. Cetere, la tradukorilataj profesioj kaj la tiel nomata “pragmatika tradukado” estas la bazoj de la fako pri literatura tradukado, kiu estas, kadre de aŭtomatigo kaj ekonomia povo, pli limigita.

Krom la diverseco, ni komprenu, ke tradukado estas esenca parto de tio, kio formas nian komunan homecon. Ĉiuj tiuj elementoj povas kaj devas esti konsiderataj kiel partoj de la sama tutaj. Pli ol kosto, ĝi estas investo.

Tradukado certe meritas esti pli bone konata kaj praktikata. Unue, ĉar, per la rego de lingvo, ĝi estas grandioza ilo por klarigo kaj klerigo. Kaj ankaŭ je socia nivelo, ĉar ĝi permesas interŝanĝon, respektante la

lingvan kaj kulturan diversecon. Tion ne povas ebligi unuopa aŭ dominanta lingvo. Fakte, oni povas aserti, laŭ la opinio de Claire Joubert, profesoro pri anglalingva literaturo ĉe Universitato de Vincennes (Francio), ke per tradukado eblas “pensadi laŭlonge de la tuta ĉeno, de lingvo ĝis politiko”. Tradukado estas ja diskreta aktivaĵo, sed eksterordinara instigilo. Ĉiu povas laŭplaĉe uzi ĝin: tradukado ne ekskludas. ■

**-El la franca esperantigis Frank Lappe  
(Germanio)**

Profesoro pri literaturaj esploroj ĉe la Universitato de Kebekio en Montrealo. Lori Saint-Martin estas eseisto, novelisto, konferenca interpretisto kaj literatura tradukisto. Ŝi ĵus publikigis la libron *Necesa Bono, Laŭdo al Literatura Tradukado* (*Un bien nécessaire, éloge de la traduction littéraire*), 2022.

# Ĉu tradukistoj bezonas simili la aŭtorojn, kiujn ili tradukas?

Ĝuste prezenti la voĉon de la aŭtoro, jen la rolo de tradukisto. Tamen ĉu tiu reprezenta tasko postulas certan similecon kun la aŭtoro? Se jes, kiugrade? Kvankam la temo ne estas nova, ĝi lastatempe fariĝis objekto de pasia debato. Krom stimuli diskutojn inter disvastigantoj de universalismo kaj defendantoj de diverseco, ĝi starigis la kompleksan demandon pri legitimeco en tradukado.

**K**iel kuniĝo de almenaŭ du lingvoj kaj kulturoj, tradukado kaj diverseco estas nedisigeblaj. Tradukado restas profunda sperto pri alieco, eĉ kiam la homo tradukita estas kulture simila al ni. Multaj tradukistoj, post enamiĝi al libro verkita de iu "rase" kaj kulture tre malsama ol ili mem, serĉis eldonejon kiu volus publikigi la tekston de tiu aŭtoro en nova lingvo. Jen kial multaj el ili ĉagreniĝis pro la 2021a polemiko pri traduko de poemo de Amanda Gorman.

Ni rapide rememoru la okazaĵon: kiam la germana eldonejo *Meulenhoff* anoncis la inviton de Marieke Lucas Rijneveld - juna neduumulo\* ĵus gajninta la Internacian Booker-premion (angle *International Booker Prize*) pro sia unua novelo - por traduki *The Hill We Climb*, la poemon legitan de Amanda Gorman en la malferma ceremonio de usona prezidento Joe Biden, la ĵurnalisto Janice Deul demandis kial la eldonejo anstataŭe ne elektis nigran junulinon. Rijneveld haste anoncis sian rezignon pri la projekto, dum multaj furiozaj literaturaj gravuloj postulis la rajton traduki, sen limigoj, homojn tre malsamajn ol ili mem.

Tiuj protestoj - kiuj estis antaŭvideblaj kaj iasence kompreneblaj (kvankam ne tre rafinitaj) - tuj sufokis la debaton. Tamen mi persone kredas, ke la afero estas tre kompleksa. Nek la retoriko pri rajtoj ("mi rajtas traduki kiun ajn mi volas"), nek la identecaj trudaĵoj ("nur juna nigra virina poeto devus traduki alian junan nigran virinan poeton") kapablas doni definitivan respondon.

Por kelkaj homoj, demandi "kiu povas traduki kiun?" estas fari politikon je la kosto de literaturo. Sed ili ŝajnis, ke la traduka mondo estas perfekte justa kaj harmonia, aŭ estis tia, ĝis alveno de la lupro de diverseco en la gregejon. Tamen tio ne veras - la eldona mondo, kiu inkluzivas la tradukan mondon, estas plena je konfliktoj

pri povo, kiujn la afero pri Amanda Gorman almenaŭ sukcesis eltiri el ombro: genraj, "rasaj" kaj klasaj rilatoj, kaj geopolitikaj rilatoj.

## Iluzio de diverseco


Abundo da tradukaĵoj inter la "novaj titoloj" disponeblaj en librejoj donas al ni falsan impreson pri aliro al verkoj el la tuta mondo, kiam, en pli atenta rigardo, tiu monda "diverseco" fakte estas sufiĉe sameca - kelkaj lingvoj, kelkaj landoj, internacia elito, kelkaj dominantaj homoj. Ĝis antaŭ nelonge, la historio de tradukado estis de blankaj privilegiitaj viroj tradukantaj unuj la aliajn aŭ tradukitaj de virinoj.

Kiel en pasinteco, tradukado restas sub la superregaj rilatoj inter Nordo kaj Sudo, inter "rasoj", lingvoj kaj kulturoj, ĉu hegemonia aŭ ne. Rasigitaj fremdaj aŭtorinoj, kiuj atingas nin per tradukaĵo, kutime apartenas al tutmonda elito kaj verkas en la lingvo de eksa koloniisto (angla, nederlanda, franca, itala, portugala, hispana ktp), estas publikigitaj en Novjorko, Londono, Parizo. Por ĉiu barata aŭtorino tradukita el la hindia, marata aŭ malajala, ekzemple, estas dekoj, eĉ centoj, tradukitaj el la angla.

“  
Tradukado forte  
ŝanĝas nin,  
ŝanĝas la centron  
kaj perturbas  
la dominantan  
ideologion

\* Neduumulo, neduuma genro, termino por la genroj kie la individuo ne apartenas al la genra duumo.





Eĉ inter malplimultoj, subpremitaj aŭ marĝenigitaj, kompleksaj hierarkioj aperas. Dum nigra usona virina verkisto hejme suferas pri rasismo, ekstere ŝi profitas de la tutmonda hegemonio de sia lando. Ŝi havas multe pli grandan ŝancon esti tradukita kaj internacie diskonigita ol nigra virino kiu loĝas en Afriko kaj skribas, ekzemple, en la volofa lingvo\*. Por ricevi kulturalan kapitalon, vi ja devas posedi ĝin.

Kvankam estas malfacile havi ampleksajn statistikojn, ŝajnas ke viroj estas pli tradukitaj ol virinoj. Dum la pinto de la latinamerika prospero, preskaŭ neniu ina verkisto estis tradukita, kaj generacio de gravaj aŭtorinoj (Cristina Peri Rossi, Luisa Valenzuela, Elena Garro, Silvina Ocampo) restis en la ombro. Inter 2011 kaj 2019, ĉirkaŭ 26% de la tradukita fikcio aŭ poezio en Usono estis verkita de virinoj.

Mi ja povas aŭdi la apostolojn de la "granda universala literaturo" (nocio kreita kaj konservita de dominantoj) deklari, ke estas la plej bonaj verkoj kiuj

meritas distribuiĝi tra la mondo. Tamen, kiuj faras la eldonajn decidojn, ĉu ne la superregantoj? Kion la apostoloj de kompleta libereco por tradukistoj ofte forgesas diri, estas ĝuste kiom blanka la tradukista komunumo estas. En Usono, esploro de *Gildo de Aŭtoroj (Authors Guild)* en 2017 montris, ke 83% de la aktivaj tradukistoj estis blankaj kaj 1,5% estis nigraj aŭ afrikdevenaj.

## Eliri el mem-segregacio

La profesio do bezonas malfermi sin al novaj kaj pli diversaj tradukistoj, anstataŭ resti konservajo de blankaj homoj. Multo estis dirita pri la graveco de ekzemploj por diskriminaciitaj grupoj - se homoj "kiel vi" neniam verkis, vi malfacile imagos vin kiel verkisto. Simile, se la vasta plimulto de tradukistoj estas blankaj kaj mezklasaj, kiel alirasa aŭ aliklasa homo povas imagi sin en tiu kampo?

Tio dirita, afineco ne ĉiam estas bazita sur identeco - ĝi povas esti bazita sur stilo, voĉo aŭ temo. Aliaj profundaj interligoj

povas krei la necesan energion por tradukado. Unu inter miaj fikciaj verkoj estis angligita de kebekiano multe pli juna ol mi, kaj hispanigita de argentina viro iom pli maljuna. Mi neniam pensis, ke ili ne taŭgis ĉar ili estas viroj aŭ malsamaj al mi en aliaj ecoj.

La franc-konga novelisto Alain Mabanckou havas amuzan dirajon pri elekto de tradukisto - "Laŭ mi, ne gravas la koloro de kato, kondiĉe ke ĝi kaptos la muson". Aliaj povus konsideri la katan genealogion fundamentan. Kelkaj homoj el dominitaj kaj marĝenigitaj grupoj preferas esti tradukitaj per iu kiel ili, dum aliaj estos feliĉaj akceptante iun "ne-diversan".

En venontaj jaroj - kaj ni ankoraŭ estas ĉe la komenco - ni vidos la stariĝon de tradukistoj el minoritataj aŭ marĝenigitaj grupoj kaj devenoj. Tamen, ĉar kompetenteco ne *nur* baziĝas sur identecaj aferoj, ni devas eviti limigi homojn al "sia" grupo, escepte se ili preferas dediĉi sin ekskluzive al tio.

Finfine, ni revenu al la afero de Amanda Gorman. Sen aserti, ke neniu blanka homo kapablas bone traduki ŝin, mi ja kredas ke - en tiu kazo simbola kaj multe priatentita de amaskomunikiloj - la elekto de juna nigra virina tradukisto estus ne nur grandioza simbola kaj politika ago, sed ankaŭ signo de subteno al diverseco.

Pli ĝenerale, parte pro socia egaleco, gravas traduki malpli privilegiiitajn kaj pli diversajn verkistojn. Por permesi ke aliaj voĉoj, sufokitaj de falsa tutmondiĝo, kio fakte estas nur reviziita versio de la antikva koloniismo, estu aŭskultataj.

Ni tradukas (kaj legas tradukaĵojn) tiel, ke ni ne trovu nin en nenatura, perforta "mem-segregacio" kreita per forviŝo kaj ekskludo. Tradukado forte ŝanĝas nin, montras al ni, ke ni ne estas la centro de la mondo, ŝanĝas la centron kaj perturbas la dominantan ideologion. En sia plej bona esprimo, ĝi estas diverseco mem, la mondo, la mondoj, sur niaj fingropintoj. ■

**-El la angla esperantigis Rafael Lima (Brazilo)**

\* La volofa lingvo estas lingvo de la atlantika subgrupo de la niĝerkonga lingvaro.

# En Meksiko, per desegnaĵoj oni tradukas vortojn

Publikigita en 2021, la libro *Netradukeblaj (Intraducibles)* montras serion da vortoj de indiĝenaj lingvoj sen ekvivalentoj en la hispana.

**E**n januaro 2022, dungitoj de hotelo de Tulum, turisma urbo de la Duoninsulo Jukatano, manifestaciis sur la stratoj de la urbo. Kio estas iliaj postuloj? Akiri la rekonon de siaj sociaj rajtoj kaj protesti kontraŭ la regulo malpermesanta al ili paroli sian lingvon, la majaan.

La evento ne estas sensignifa. Kun siaj 68 indiĝenaj lingvoj, Meksiko estas unu el la plej diversaj nacioj de la mondo laŭ lingva vidpunkto. Sed tiu riĉa diverseco erodiĝas. Tio parte okazas ĉar indiĝenaj lingvoj ekzistas en multaj variantoj, kio signifas, ke parolantoj de la sama lingvo ne nepre komprenas unu la alian. La ĉefa kialo de la malkresko estas tamen la superrego de la hispana, kiu estas uzata por ĉiuj oficialaj, literaturaj kaj edukaj celoj.

En tiu kunteksto situas la laboro realigita per la libro *Netradukeblaj (Intraducibles)* de Irma Pineda – zapoteka poeto, parolanto de la lingvo Didxazá

kaj reprezentanto de indiĝenaj popoloj ĉe Unuiĝintaj Nacioj. Publikigita en 2021, la libro kolektas kaj ilustras 68 vortojn de 33 lingvoj de la indiĝenaj popoloj de Meksiko, kiuj ne havas hispanan tradukon. Ĉiu vorto havas korespondan ilustraĵon kiu prilumas ĝian netradukeblan naturon.

## Sondi la kolektivan memoron

“*Netradukeblaj* naskiĝis de konversacio kiun mi havis kun Gabriela Lavallo, direktoro de la Meksika Kultura kaj Turisma Centro de Houston en Usono, pri la libro *Perdita en tradukado (Lost in translation)* de Ella France Sanders, kiu listigas netradukeblajn vortojn en multaj lingvoj”, diras Pineda. “En indiĝenaj lingvoj, ekzistas ankaŭ vortoj kiuj temas pri emocioj, sentoj kaj tradicioj, kiuj estas tre malfacile kapteblaj per ununura vorto en la hispana”.

“**Kun siaj 68 indiĝenaj lingvoj, Meksiko estas unu el la plej diversaj nacioj de la mondo laŭ lingvistika vidpunkto**

Ekzemple, la termino *ndúyuu*, kiu en la zapoteka lingvo rilatas al korpa pozicio kiun oni adoptas por ripozi. En la libro, tio estas ilustrita per personoj en la feta pozicio. Aliaj ekzemploj estas *chuchumi*, kiu signifas “fiksrigardi en la vakuon” en la akateka (Akateko); *ke ndse'*, rito dediĉita al Tero kiu konsistas el metado de ŝtonoj en riveron por certigi la sanon de novnaskita infano en la ĉatina (Chatino); aŭ *watsapu*, kiu rilatas al speciala folio uzata por faldi tamalojn kun nigraj fazeoloj en la totonaka (Tutunakú).

La libro, produktita kun la subteno de la Nacia Instituto pri Indiĝenaj Lingvoj de Meksiko, la eldonejo *Santillana* kaj la Nacia Oficejo de UNESKO en Meksiko, estis oportuno por sondi la kolektivan memoron de la parolantoj. Ili estis invititaj esplori sian propran lingvon por trovi vortojn kiuj havas nenium ekvivalenton en la hispana.



© Mark Quijano

▼ Ilustraĵo de la vorto *chuchumi*, kiu signifas “fiksrigardi en la vakuon” en Akateko.





🌀 Tu nombre es el remedio

si te encuentras esta planta.

Y dile que chakis se llama.

Dilo fuerte, que no te detenga el miedo

▼ Ilustrajo de la vorto chakis, planto kiu, laŭ la parolantoj de la naŭatla, provokas haŭtan erupcion al la persono kiu rigardas ĝin, krom se oni diras sian propran nomon sekvatan de tiu de la planto. La ilustrajo estas akompanata de poemo de Irma Pineda.

La ideo estas ke tiuj vortoj, elfositaj de maljunuloj, trovi spacon en ĉiutaga vivo. “La fakto, ke homoj vidas sian lingvon, siajn vortojn en libro, en skriba kaj ilustrita formo, donas al ili sencon kaj beligas ilin. Homoj rekonektiĝas kun vorto kaj rehavas amon por sia lingvo”, diras Pineda.

## Vortoj el koro

Junuloj ludas ŝlosilan rolon en la revalorigo kaj la uzado de tiuj lingvoj. Kelkaj jam komprenis tion. Por Érika Hernández,

juna naŭatla pentristo el la ŝtato Morelos en centra Meksiko, la naŭatla estas lingvo kiu portas ekskluzivigan vidpunkton pri la mondo kaj ne distingas inter seksoj. “La sento estas malsama kiam mi uzas kelkajn vortojn por priskribi naturon aŭ emocijon”, ŝi klarigas, “Temas pri io tre persona, kio venas de la koro kaj riskas perdi sian signifon se oni tradukas ĝin”.

*Intraducibles* sukcesas palpebliki kelkajn vortojn kaj speguli ilian profundecon kaj signifon, tiel ofertante pli profundan komprenon pri indiĝenaj kulturoj, de kuirarto al ritoj. Legante tiujn

vortojn, ni lernas pli pri la ideoj malantaŭ niaj manĝaĵoj, niaj festoj kaj niaj kredoj.

Multaj lernejoj, ĉefe en indiĝenaj vilaĝoj, jam mendis la libron. Malgraŭ tiu sukceso, Pineda bedaŭras, ke ŝi ne povis trovi vortojn en ĉiuj 68 ekzistantaj lingvoj. “Kelkaj lingvoj multe suferis”, klarigas la poeto, kiu priploras la daŭran malestimon pri indiĝenaj lingvoj kaj la nescion pri ili, “Sed ni ne povas aprezi kion ni ne konas”, ŝi konkludas. ■

-El la angla esperantigis **Manuela Burghelea (Brazilo)**

© Cynthia D. Hernández Palomino



**Junuloj ludas ŝlosilan rolon en la revalorigo de indiĝenaj lingvoj**

▼ La termino *ndúyuu*, kiu en la zapoteka lingvo rilatas al ripoza korpa pozicio.

## Internacia Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj (2022-2032)

Dum indiĝenaj popoloj konsistigas nur 5 elcentojn de la monda loĝantaro, ili parolas 6 000 el ĝiaj 7 000 lingvoj.

Laŭ Unuiĝintaj Nacioj, pli ol 30 elcentoj de la lingvoj de la mondo malaperos ĝis la fino de tiu ĉi jarcento pro manko de parolantoj, instruado, literaturo, heredigo aŭ politika engaĝiĝo. La perdo de indiĝena lingvo ne nur malriĉigas lingvan diversecon, ĝi ankaŭ kondukas al neinvertigbla perdo de tradiciaj scioj.

Celante mildigi tiun tendencon kaj konservi tiun heredaĵon, Unuiĝintaj Nacioj proklamis la Internacian Jardekon de Indiĝenaj Lingvoj 2022-2032. Tiu Jardeko, gvidata de UNESKO kunlabore kun Departemento de UN pri Ekonomiaj kaj Sociaj Aferoj kaj aliaj rilataj

agentejoj de UN, celas altiri atenton al la serioza perdo de indiĝenaj lingvoj kaj al la bezono konservi, revigligi kaj antaŭenigi ilin, inkluzive kiel iloj por edukado.

La Deklaro de Los Pinos, aprobita en februaro 2020 en Meksik-urbo sub la instigo de Meksiko, kaj la Tutmonda Agadplano prezentita en 2021, stimulas la realigon de konkreta tutmonda agado por la konservado de indiĝenaj lingvoj.

-El la angla esperantigis **Manuela Burghelea (Brazilo)**



Filologo, helenisto kaj filozofo, membro de la Franca Akademio kaj fondmembro de la Internacia Reto de Filozofinoj sponsorata de UNESKO. Barbara Cassin publikigis multajn librojn, inkluzive de *Laŭdo de la traduko* (*Éloge de la traduction*), publikigita en 2016. Ŝi redaktis la *Vortaron de Netradukeblaĵoj*, unue publikigita en la franca en 2004.

# Barbara Cassin: “Ni devas rezisti la tutmondiĝon de lingvoj”

Ĉiu lingvo entenas unikan vizion de la mondo, klarigas la franca filozofino Barbara Cassin, kiu difinas tradukadon kiel scipovo por trakti diferencojn.

Intervjuo kun Agnès Bardon

UNESKO

**Por komenci, jen demando pri difino – kio estas tradukado?**

Traduki signifas konduki, oferti trairejon de unu lingvo al alia. La ekspozicio, kiun mi faris en 2016 en Mucem (Muzeo de Eŭropaj kaj Mediteraneaj Civilizacioj) en Marsejlo, titolita *Post Babelo, traduki* (Après Babel, traduire), malfermiĝis kun la diversaj manieroj diri “traduki”. Traduki devenas el la latina vorto *traducere*, ne el la antikva greka, kiu ne havis ekvivalenton kaj uzis alian vorton: *hermêneuein*, kiu signifas “interpreti”. En la araba, la vorto “traduki” ankaŭ signifas interpreti. En la ĉina, antikvaj tekstoj prezentas tradukon kiel la agon turni brodaĵon el silko – la malantaŭa flanko ne estas sama kiel la antaŭa flanko, kaj tamen ambaŭ estas la sama afero. Ĉi tio estas bela metaforo. Traduki signifas transformi unu aferon en alian, kaj la du estas tiom proksimaj, ke, kiel diris la argentina verkisto Jorge Luis Borges, estas la originalo, kiu provas simili al la traduko.

Ĉiu lingvo havas sian propran forton kaj koheron, kion ni foje nomas ĝia “genio”. Ni devas imagi, ke io pli ol simpla ŝanĝo de vestaĵoj okazas en ĉi tiu procezo, kontraŭe al tio, kion Platono priskribas en *Kratilo*. Kio okazas, estas ŝanĝo de personeco. Do traduki estas meti ion fremdan en tion, kio estas nia, kaj ŝanĝi ambaŭ. Ĝi estas, laŭ bela esprimo de Jaufré Rudel, okcitana trobadoro de la dekdua jarcento, “la gastejo de tio malproksima”.

**Ĉu oni povas pensi en pluraj lingvoj?**

Kiam ni pensas en unu lingvo, ni nepre pensas en pluraj lingvoj, alivorte, kompare kun aliaj lingvoj. En antikva Grekio, tradukado ne estis problemo, ĉar oni konsideris, ke ekzistas nur unu lingvo; *logos* estis samtempe racio, parolkapablo (*ratio et oratio*, tradukita en la latina) kaj lingvo – la greka lingvo. Por la grekoj, la *logos* estas universala, ĝi difinas la homecon. Sed tiam la neparolantoj de la greka estis “barbaroj”, onomatopeo kiel blablabla, por nomi tiun, kiu ne estas komprenata, kiu ne parolas kiel mi, kaj kiu eble ne estas homo kiel mi.

Por pensi en mia lingvo, mi devas pensi ankaŭ en aliaj lingvoj. Kiam mi diras *bonjour* en la franca, mi ne diras *salaam* aŭ *shalom*. Malsame al la araba kaj la hebrea, mi deziras al vi ne pacon, sed nur bonan tagon. Mi ankaŭ ne deziras, ke vi, kiel la antikvaj grekoj, *khaïre*, ĝoju, ĝuu. Mi ne deziras, ke vi, kiel en la latina, *salve*, estu sana. Mi simple malfermas la tagon. Ĉiu lingvo tiel implicas vizion de la mondo. Sed ni devas tuj aldoni, ke ĉiu lingvo estas laŭdifine miksita ne ekzistas rasa pureco de lingvo. Vortoj, kiel pensoj, estas en evoluo, ili estas importataj, eksportataj,

digestataj. Ĉiu lingvo estas procezo, energio, ne fermita verko. Lingvoj neniam ĉesas interagi.

**En 2004 vi redaktis la Vortaron de Netradukeblaĵoj. Kion precize vi celas per “netradukeblaĵoj”?**

Mia intereso pri la netradukeblaĵoj devenas de la praktiko traduki pensulojn el la periodo antaŭ Sokrato. Ĉar la sintakso kaj semantiko de la greka ne estas tiuj de la franca, ĉiam ekzistas pluraj eblaj tradukoj. La *Vortaro de Netradukeblaĵoj* atestas, ke eĉ en filozofio ni parolas kaj pensas per vortoj – tio estas, per lingvoj – kaj ne ekzistas ĝenerala universala ponto.

Kiam mi diras *mind* en la angla, mi tute ne diras *geist* en la germana kaj mi tute ne diras pri spirito. Depende de ĉu oni tradukas la verkon de Hegel titolitan *Phénoménologie de l'esprit* el la franca kiel *Phenomenology of the Mind* aŭ *Phenomenology of the Spirit* en la anglan, la rezulto estus du tute malsamaj libroj.

La netradukeblaĵo ne estas ambigua. Certe, en la *Vortaro de Netradukeblaĵoj*, multaj terminoj estas ambiguaj en unu lingvo kompare kun alia. Ekzemple, la vorto *pravda* en la rusa ne signifas nur “veron”. Antaŭ ĉio ĝi signifas “justecon”. Estas alia vorto por vero en la signifo de precizeco: *istina*. Do, en la rusa, nia franca veron *vérité* estas ambigua. Se vi alprenas la francan kiel bazo, estas la vorto *pravda* kiu estas ambigua. Vorto ĉiam rilatas al iu vidpunkto. Homonimio estas unu el

“  
Ĉiu lingvo estas  
procezo, energio, ne  
fermita verko



la malfacilaĵoj plej signifoplenaj, kiam ni tradukas.

Kio interesas min, estas la malkonkordo inter lingvoj, ilia neekvivalenteco, semantika, sed ankaŭ sintaksa kaj

gramatika. La netradukeblaĵo ne estas tio, kion ni ne povas traduki – ni povas traduki ion ajn – sed kion ni neniam ĉesas (ne)traduki. Tradukado estas movado. La filozofo Wilhelm von Humboldt diris, ke li neniam renkontis lingvaĵon, nur lingvojn – “panteonon”, ne preĝejon.

**Traduki ankaŭ signifas elekti. Oni tradukas kelkajn tekstojn prefere ol aliajn kaj en iujn lingvojn prefere ol aliajn. Ĉu tradukado spegulas superregajn rilatojn?**

Lingvo esence estas politika afero. Ĉiam estas tiel. La greka difino de *logos*, evidente estis ankaŭ politika, kaj la *Vortaro de Netradukeblaĵoj* estas elpensita por funkcii kiel militmaŝino kontraŭ du danĝeroj, kiuj minacas Eŭropon.

La unua estas lingva “naciismo”, kiu starigas hierarkion inter lingvoj, kun la greka kaj la germana ĉe la pinto kiel “aŭtentikaj” lingvoj. La dua danĝero estas tiu de “globish”, la tutmonda angla, kiu supozeble estas ĉies lingvo. Sed paroli ne estas nur komuniki. *Globish* estas la plej malriĉa el ĉiuj lingvoj, la lingvo de fakraportoj kaj dosieroj. La lingvoj de kulturo, inkluzive de la angla, kiuj estas kreitaj de aŭtoroj kaj verkoj, skribitaj aŭ parolataj, troviĝas en la pozicio de dialektoj, por esti parolataj hejme.

Ni devas rezisti al ĉi tiu alnivelega tutmondiĝo de lingvoj. Kiam mi estis ĉe la Franca Nacia Centro por Scienca Esploro, mi rifuzis permesi al la esploristoj, sub mia respondeco, verki rekte en la angla. Mi petis ilin skribi en la franca kaj ke ilia laboro sekve estu tradukita en bonan anglan.

**Lingva diverseco estas sendube valora, sed kiel ni sukcesu starigi komunan bazon el tiu diverseco?**

Por atingi tion, ni devas pripensi la diferencojn. Ni devas doni al ni la kondiĉon por kompreni tion, kion ni ne komprenas. Jen unu el la kaŭzoj, kial ni fondis la asocion nomatan *Maisons de la sagesse – Traduire* (Domoj de Saĝeco – Traduki). Unu el ĝiaj ĉefaj celoj estas establi terminarojn pri franca administracia terminologio por helpi tiujn, kiuj alvenas en Francion, kaj tiujn, kiuj bonvenigas ilin. Nenio estas malpli simpla ol doni sian nomon, antaŭnomon kaj naskiĝdaton. Kiam ekzemple maliano havas familinomon de ĉasisto aŭ militisto, lia edzino ne povas porti ĝin, kio prezentas tutan serion da problemoj al la administrado. Kaj kiel oni difinas naskiĝdaton de iu veninta el lando, kiu ne uzas la saman kalendaron? La problemoj, kiujn alfrontas alvenintoj, estas ŝarĝitaj de jarcentoj da franca burokratio. Ni provas klarigi tion en tiuj glosaroj, per kiuj ni donas unu al la alia injektojn de kulturo. Tradukado estas tiel grava, ĉar ĝi estas kompetenta kapablo por trakti diferencojn. ■

**-El la angla esperantigis Ursula Grattapaglia (Brazilo)**



**Kun globish, la lingvoj de kulturo, inkluzive de la angla, trovas sin en la pozicio de dialektoj**

Ilustrajo: © Sylvie Serprix por UNESKO-Kuriero



# Donkiĥoto: De la kastilia al la ĉina kaj reen

Antaŭ jarcento aperis la unua eldono de *Donkiĥoto* en la ĉina, farita de Lin Shu, memlerninta ĉina intelektulo. Tiu ĉi tre kreiva versio de la verko de Cervantes, adaptita por la ĉinaj legantoj, estas nun tradukita en la hispanan – jen elstara ekzemplo de kultura hibridigo.

**T**ra kvar jarcentoj de ekzistado, la verko *Donkiĥoto* de Miguel de Cervantes fariĝis unu el la plej multe legitaj, tradukitaj kaj analizitaj literaturaĵoj tutmonde. Ĝian eksperimentan formon kaj literaturan ludemon oni agnoskis kiel bazon de la moderna literaturo. Ĝi invitas la legantojn sekvi la hispanan sinjoron Donkiĥoto, kiu surbaze de siaj propraj fantazioj, fariĝas vojaĝanta kavaliro. Akompane de sia fidela helpanto Sanĉo Panza, li entreprenas pikareskajn aventurojn en 17-jarcenta Hispanio, postlasante en ilia itinero spurojn de humuro, romantika amo kaj malĝojo.

Dekomence publikigita en du volumoj, en 1605 kaj 1615, la unua versio de tiu ĉi hispana klasikaĵo aperis en la ĉina nur tri jarcentojn poste. En 1922, Lin Shu (1852-1924), verkisto kaj tradukisto el Fujian, aperigis tradukon sub la titolo *Historio de la Ensorĉita Kavaliro (Moxia Zhuan)*. Plej rimarkinda fakto pri tiu ĉi traduko estas, ke Lin ne scipovis la hispanan. Fakte, li ne scipovis iun ajn okcidentan lingvon.

## Konfucea Donkiĥoto

Helpe de sia asistanto Chen Jialin, Lin konatiĝis kun la aventuroj de la hidalgo laŭ diversaj versioj aperintaj en la angla. Rezulte de esploroj faritaj de kelkaj specialistoj pri Cervantes, oni asertas ke la traduko de Lin plej probable baziĝis sur tiu de la angla verkisto kaj tradukisto Pierre Motteaux, aperinta en 1885. Iel ajn, Lin intermiksas en sian version inventitajn dialogojn, kaj mallongigis la tuton je kelkaj ĉapitroj, inkluzive de la enkonduka monologo, tiel ke lia produkto fariĝis pli “transkreitaĵo”, re-imagita versio pli bone adaptita al malsimila kulturo, ol vera tradukaĵo.

Lin ne nur reinventis scenojn kaj adaptis popularajn hispanajn diraĵojn al *chengyu*, tipa tradicia ĉina parolmaniero per idiomaĵoj, sed ankaŭ aliigis la rolulojn. En lia versio, Donkiĥoto estas pli saĝa ol freneza, lia asistanto Sanĉo Panza fariĝas lia disĉiplo kaj lia amata karulino Dulcinea, fariĝas la “Jada Damo”. Lia mortmalsatanta ĉevalaĉo Rocinante estas promociita al “rapida ĉevalo”, kaj li forigas ĉiujn referencojn al Dio. La magia

© Shanghai Library



▼ La kovrilo de la unua eldono de la reinterpreto de *Donkiĥoto* en la ĉina de Lin Shu (1922), konservita en la arkivejo por antikvaj libroj ĉe la Ŝanhaja Biblioteko.

vervo de Lin tiel rekreas la rakonton kiel “malpli frenezan kaj pli romantikan”, kiel asertas Alicia Relinque, fakulo pri ĉinaj studoj kaj tradukisto, profesoro pri klasika ĉina literaturo en la Universitato de Granada, ke *Donkiĥoto* fariĝis romantika heroo pli familiara al la legantoj de ĉina literaturo.





La malsimilaĵoj inter la originalo kaj la traduko de Lin etendiĝas pli vaste ol al aferoj de formo. Per interplektado de ĉarmo kaj saĝeco kune kun konfuceaj valoroj kaj lokaj eldiraĵoj en la spritan tekston de Cervantes, Lin donis al Donkiĥoto eĉ pliajn ĉinajn nuancojn. Ekzemple, la kavalireca heroo transformiĝinta en konfucean erudiciulon subtenas la tradiciajn valorojn, kiel amon de gefiloj al gepatroj kaj prauloj kaj respekton je la pasinteco, kaj per transformado de la helpanto en disĉiplon, li ŝanĝis la rilaton mastro-servanto al tiu de instruisto-disĉiplo, kiu sekvas la konfucean tradicion de respekto al la majstroj.



**Moxia Zhuan**  
estas "transkreado"  
anstataŭ tradukado

## La Ensorĉita Kavaliro revenas al La Manĉo


Dum la tempo kiam Lin aktivis, Ĉinio estis perforte malfermita al la ekstera mondo. En tiu kunteksto, Lin volis ke liaj tradukoj de literaturaj verkoj servu por pli bone konatigi la eksteron al la ĝenerala publiko. Malgraŭ la aldonoj, forĵetoj, distordajoj kaj eĉ misrepresentoj, lia *Historio de la Ensorĉita Kavaliro* kun vastaj komentoj kaj interpretoj fariĝis alte aprezata inter la ĉinaj intelektuloj. Ĝin laŭdis elstaraj verkistoj, ekzemple Mao Dun kaj Zheng Zhenduo, kaj ankaŭ la renoma literatura fakulo kaj verkisto Qian Zhongshu iam diris, ke ĝuste la plej evidentaj elementoj de volonta misrepresentado, pli-malpli evitis, ke la tradukoj de Lin estu entute ignorataj.

El la vidpunkto de retoriko kaj verkada tekniko, la reinterpretado de *Donkiĥoto* de Cervantes fare de Lin vere

## Kio estas la kolekto de Reprezentaj Verkoj de UNESKO?

Inter 1948 kaj 2005, ĉi tiu programo de UNESKO estis dediĉita al tradukado de la plej gravaj verkoj de la monda literaturo, ĉefe de lingvoj malmulte parolataj al tiuj pli etenditaj, sed ankaŭ en la mala direkto. En 2005 la katalogo entenis 1060 verkojn, inter kiuj troviĝas libroj tiel diversaj kiel *Je suis un chat*, de la japana verkisto Soseki Natsue (tradukita el la japana en la francan), *Aus dem Diwan*, de la persa poeto kaj rakontisto Saadi (el la persa en la germanan), aŭ *Hamlet*, de Ŝekspiro (el la angla en la indonezian).

-El la angla esperantigis Orlando E. Raola (Usono)



© The Commercial Press / Bildoj de Liu Bangyuan.

▼ Kovrilo de la dulingva eldono (hispana kaj ĉina) de *Historio de la Ensorĉita Kavaliro*, hispanigita de la fakulo pri Ĉinio kaj tradukistino Alicia Relinque.

malfermis la mondon al multaj. Sed malgraŭ la laŭdoj, kelkaj forte ĝin kritikis, kaj akuzis Lin je mistradukado, kiu forigis esencajn trajtojn de la originalo. Kiam pli fidelaj versioj de la verko aperis en la ĉina poste, la rimarkinda traduko de Lin estis preskaŭ forgesita sur la kampo de ĉina literatura tradukarto.

En 2013, kiam Inma González Puy, direktoro de la Instituto Cervantes en Sanhajo, malkovris la version de *Donkiĥoto* faritan de Lin, ŝi iniciatis la ideon savi la forgesitan tekston kaj traduki ĝin reen en la hispanan. Kun la helpo de Relinque, ŝi volis montri kiel la bildo de *Don Quijote* estis akceptita en Ĉinio antaŭ jarcento. Sojle de la 405-a datreveno de la morto de Cervantes, la traduko de Relinque, *Historia del Caballero Encantado*, estis finfine publikigita – inkluzive de pli ol 650 piednotoj portantaj informojn pri kuriozaj aspektoj, kiuj povas alporti al la legantoj pli bonan komprenon pri Ĉinio kaj pri la ĉina kulturo.

La dulingva eldono de Relinque de *Historio de la Ensorĉita Kavaliro*, estis anoncita kiel plenumo de la reenhejmiĝo de Donkiĥoto post jarcento kaj kiel literatura hibrida panoramo en la historio de la monda literaturo. Por Relinque, ĝi estas "perfekta ekzemplo pri kiel la literaturo vojaĝas de unu lando al alia". Fakte, la versio de Lin de *Donkiĥoto* ne estas la sola ekzemplo de transkreado en la historio de tradukado. Aliaj ekzemploj inkluzivas vaste akceptitajn misprezentojn en la verko de la ĉina poeto Han Shan, same kiel la klasika manuskripto *Daŭdeĝingo*, por nomi kelkajn. Oni neniam malhelpis tiajn transkreaĵojn – tian moviĝon en novan medion. Ili ja riĉigas kulturen kaj intelektan vivon tra la mondo. ■

-El la angla esperantigis Orlando E. Raola (Usono)



# Humuro: Vera enigmo por tradukistoj

Laŭ esenco de kulturo, humuro ne estas facile tradukebla de unu lingvo al alia. Por konservi la spiriton de la origina ŝerco, la tradukisto devas havi grandan inventemon.

**K**io igas vin ridi? Kion vi perceptas amuza povas varii depende de unikaj trajtoj kiel aĝo kaj personeco, sed kulturo kaj lingvo ankaŭ estas ŝlosilaj determinaj faktoroj. Humuro estas integra parto de la kulturo en kiu ĝi estis kreita kaj supozeble, ĝi povas esti unu el la plej malfacilaj aferoj por traduki.

Ĉar humuro ofte rilatas al lingvo mem – ekzemple kalemburoj, regionismoj, vortludoj kaj kulturaj referencoj – la laŭvorta traduko de ŝerco plejofte estus ne komprenebla. Por konservi la spiriton de ŝerco, la tradukisto alfrontas la dilemon konservi la originan signifon (kiel ekzemple konservado de la laŭvorta traduko) aŭ komplete adapti ĝin en alian lingvon. La ideo estas,

ke la tradukisto kreu ion novan, sed konservante la emocijon kaj intencon de la origina enhavo.

Traduki humuraĵon ofte signifas rekrei ĝin. La malfacilo venas de tio, ke vortludo estas vorta sprito bazita sur la signifoj kaj ambiguecoj de vortoj, kaj la maniero kiel vortoj sonas kaj estas skribitaj varias de lingvo al lingvo, malfaciligante la laboron de la tradukisto. Ekzemple, ni rigardu la sekvan ŝercon, kiu enhavas vortludon en la angla: *Last night, I dreamed I was swimming in an ocean of orange soda. But it was just a Fanta sea.* En ĉi tiu kazo, la kalemburo estas, ke *Fanta sea* (en Esperanto, “maro de Fanta”) estas prononcata kiel la vorto *fantasy* (“sonĝo” aŭ “fantazio”).

## “Eblas dissekti humuron samkiel ranon, sed ĝi mortas en la procezo

*E. B. White, usona verkisto*

Por traduki ĉi tion al alia lingvo, tradukisto eble devos tute elpensi novan ŝercon kun elemento de la origina teksto, ekzemple fari alian ŝercon pri trinkaĵo, ĉar krei novan kalemburon aŭ novan vortludon eble estas la nura maniero fari humuran esprimon kiu havas senco.

## Klarigo mortigas humuron

Ĉu iam iu klarigis al vi, kial ŝerco estas (supozeble) amuza? La usona verkisto E. B. White iam skribis, ke “eblas dissekti humuron samkiel ranon, sed ĝi mortas en la procezo kaj la internaĵoj malentuziasmigas ĉiujn krom la pure sciencajn mensojn”.

Ĉi tiu citaĵo ilustras tion, kio povus okazi se la tradukisto elektas klarigi la ŝercon en alia lingvo. Ĝi povus esti lingve interesa, sed finfine mortigas la ŝercon. Piednoto aŭ klarigo povus esti eĉ ne ebla depende de la speco de enhavo, kiel ekzemple, subtekstoj de filmo aŭ la transvoĉo de videoludo.

Aldonenda defio por la tradukisto: kio okazas kiam la ŝerco estas malbona? Ĉu la tradukisto rekreu ĝin en alian malbonan



ŝercon aŭ kreu ion pli amuzan? Ĉi tio estas ofta dilemo, kies solvo kutime dependas de la aŭtorintenco. Eble estas kialo por la malbona ŝerco, pro kio esencas ke la tradukistoj transdonu tiun intencon en alia lingvo. Aliflanke, se la intenco de la aŭtoro estis ridigi la publikon, tiam oni devos strebi por ke la traduko havu la saman efikon.

## Trafi la celon

Kiam tradukisto adaptas enhavon rilatan al la lingvo mem, devas provi konservi iom el la origina ŝerco. Ĉi tio estas precipe grava se la ŝerco inkludas bildon aŭ sonon, kiel en la kazo de plurmedia enhavo.

Ni apliku ĉi tiun ideon al sceno de la usona ago-komedia filmo *Top Secret!* el 1984, kiam la du protagonistoj estas kontaktataj de iu parolanta la germanan. La heroo pardonpetas kaj diras ke li ne parolas la lingvon, sed la heroino respondas, "Ne gravas. Mi iom konas la germanan... Li sidas tie."

Ŝi montras homplenan restoracion kie malalta viro en tradicia kostumo germana ekstaras kaj mansvingas. Dum infaneco mi vidis tiun filmon plurfoje kune kun

mia familio kaj ĉiam ridis de tiu ŝerco. Ĉar en la angla, la esprimo *I know a little German* estas plursignifa: ĝi povas signifi ke iu havas lingvosociojn pri la germana aŭ konas germanon malaltan.

Tamen, kiel ĝi povus esti tradukita en aliajn lingvojn kiam bildo komplementas la dialogon? Defioj rilataj al kongruo de la kunteksto aŭ teksto kun bildo aŭ sono estas tiuj, kiujn nur la plej kreemaj kaj spritaj tradukistoj kapablas solvi.

## Ne forgesu la publikon

Se la mesaĝisto kaj la mesaĝo estas gravaj en la traduko de humuro, same grava estas la celgrupo. Por lingvoj kiuj havas malsamajn variaĵojn aŭ dialektojn, koni la celgrupon determinos kian terminaron la tradukisto povas kaj ne povas uzi. Tio aldonas kroman malfacilaĵon al la adaptiĝo, ĉar regionismo spicas la lingvon kaj ebligas proksimiĝon al specifa publiko. La aĝo de la celgrupo ankaŭ devas esti konsiderata, ĉar traduki enhavon por infanoj estas konsiderinde malsame ol traduki por pli aĝa publiko. Ekzemple, ni ne povus uzi malkonvenan lingvaĵon aŭ malsimplan vortprovizon.

Krei ŝercon por specifa celpubliko postulas inventemon kaj eltrovemon. Humuro estas kutime rilata al lingvo mem: la maniero skribi aŭ paroli vortojn, kaj la maniero kiel ili miksiĝas. Aldone, ĉiu kulturo havas sian propran unikan senton de humuro, ligitan al ĝiaj historio, tradicioj, valoroj kaj kredoj. Ofte tio signifas, ke nur homoj el specifa kulturo kapablas kompreni ŝercon aŭ konsideri ĝin amuza. Trovi la ĝustajn vortojn por konservi humuron en la cellingvo ja estas arto kaj grandega defio por la tradukisto. ■

-*El la angla esperantigis Maritza Gutiérrez (Kubo)*

“  
Traduki  
humuraĵon ofte  
signifas rekrei ĝin



Ilustraĵo: © Selçuk Demirel por UNESKO-Kuriero

## “Ĉe Unuiĝintaj Nacioj, lingvo ne estu baro”

Lama Azab, interpretisto de la franca kaj la araba en la ĉefsido de Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko ekde 2016, konsideras ke objektiveco kaj la kapablo adaptiĝi estas esencaj postuloj por tiu ĉi respondeca laboro.

### *Kiaj ecoj estas ĉefe postulataj por fariĝi interpretisto?*

Krom la evidentaj postuloj, kiel regado de la laborlingvoj, rapideco kaj ĝeneralaj scioj pri diversaj temoj, por interpretisto ege gravas la kapablo rapide kompreni la esencan mesaĝon en ajna situacio. Efektive, vi ĉiam devas klare kompreni kaj konscii pri la kernaj punktoj de la diskuto. Ankaŭ gravas neŭtraleco. Ni devas flankenmeti niajn personajn opiniojn kaj sentojn, sendepende de tio, kio estas diskutata, ĉar ĉiuj partoprenantoj estu traktataj egale en diskuto. Esti neŭtrala, kontroli siajn emociojn, certigi egalecon, kaj respekti la diversecon de opinioj de ĉiuj partoprenantoj estas ĉiama defio de interpretisto.

### *Kiajn ĉiutagajn malfacilaĵojn vi alfrontas?*

Esti interpretisto signifas adaptiĝi al ajna situacio, tio estas la dua grava postulo por tiu ĉi profesio. Vi devas lerte transiri de unu temo al alia, de unu lingvo al alia, akompani la rapidecon de la parolanto ktp.

La profesio instruas al ni modestecon, ĉar ne eblas atingi la nivelon de la fakuloj kiujn ni interpretas. Por bone plenumi nian taskon, ni devas daŭre lerni senĉese. Tio estas tre grava afero por tiuj, kiuj interpretas pri diversaj temoj, kiel ekzemple senarmigo, homaj rajtoj aŭ buĝeto. Sed lastatempe, kiel aliaj profesiuloj en diversaj fakoj tra la mondo, ni devis labori distance. En ĉi tiu situacio ni ankaŭ devas bone adaptiĝi teknike.

### *Ĉu estas specifaj pri tia laboro ĉe Unuiĝintaj Nacioj?*

Ĉe UN estas aparta zorgo pri plurlingvismo. Ni havas la respondecon certigi, ke ĉiuj komprenu tion, kion aliaj diras, kaj la parolanto ankaŭ estu certa ke aliaj komprenu lin aŭ ŝin ĝuste. Ĉi tio estas esenca afero por egaligi ĉiujn partoprenantojn dum diskutado. Lingvo ne estu baro, sed ilo por interkompreno.

Krome, terminologiaj problemoj gravas ĉe Unuiĝintaj Nacioj, ĉar terminaro ebligas al ni transdoni la valorojn de UN al la tuta mondo per la samaj vortoj. Ekzemple, antaŭ pluraj jardekoj, la koncepto de daŭripova evoluigo estis apenaŭ uzata en la araba lingvo. Nuntempe, tiu ĉi esprimo jam estas parto de ĉiutaga lingvouzo. Danke al niaj kolegoj de la lingvaj servoj de UN (tradukistoj, terminologoj, provlegantoj, redaktoroj) ni povas bone prepariĝi antaŭ ol eniri en la interpretistan kajuton. Interpretisto estas unu el la multaj eroj de longa ĉeno kio ebligas sukcesan kunvenon. ■

*-El la angla esperantigis Chimedtseren Enkhee (Mongolio)*

## Kuriero, plurlingva periodaĵo ekde 1948

Kiel unu el la unuaj internaciaj periodaĵoj, *UNESKO-Kuriero* dekomence estas publikigita en pluraj lingvoj. Tuj post sia lanĉo en 1948, ĝi aperis en la angla, franca kaj hispana. Tiu ĉi deziro publikigi la artikolojn en laŭeble plej multaj lingvoj spegulas la intencon de ĝiaj iniciatintoj – antaŭenigi vastan disvastigadon de la humanitaraj idealoj de la organizo post la Dua Mondmilito.

Evidente, danke al siaj plurlingvaj eldonoj, la *Kuriero* sukcesis atingi vastan internacian legantaron dum la jaroj, eĉ en landoj kie la gazetaro estis silentigita de la Ŝtato.

Dum la jaroj la lingvoj de la revuo plimultiĝis. En 1957, ĝi estis ekpublikigita en la rusa. Sekve oni ĝin ekeldonis en la araba, la germana, la itala kaj la japana. En 1967 estis lanĉitaj hinda kaj tamila eldonoj, kaj de 1968 ĝis 1973, la *Kuriero* aperis ankaŭ en la nederlanda, la hebrea, la persa, la portugala kaj la turka. En 1988 estis rekordo – ĝi estis eldonita en 33 lingvoj.

Nuntempe la *Kuriero* estas publikigita en naŭ lingvoj – la ses oficialaj lingvoj de Unuiĝintaj Nacioj (araba, angla, ĉina, franca, rusa kaj hispana), kaj ankaŭ kataluna, korea kaj Esperanto.

*-El la angla esperantigis Chimedtseren Enkhee (Mongolio)*



▼ Kovrilo de la numero de UNESKO-Kuriero de 1969, “La Artoj kaj la Homo”. Eldono en la tamila.

Ĵurnalisto en Kaburbo, Sud-Afriko. Li verkis du librojn pri la historio de Sud-Afriko: *Rogues' Gallery* kaj *Spoilt Ballots*.

# Alportante afrikan sciencon en la vortaron

Multaj teknikaj terminoj ne havas ekvivalenton en afrikaj lingvoj, senigante parton de la loĝantaro je scienca kulturo. Esploristoj kaj fakuloj el la tuta kontinento decidis solvi tiun ĉi problemon kaj labori por pliriĉigi la leksikonon de pluraj lingvoj.

**P**or la sudafrika scienca ĵurnalisto Sibusiso Biyela, devus esti facile skribi pri la malkovro de nova dinosaŭro en sia gepatra lingvo, la zulu. Sed kiam li komencis verki la artikolon, kiel li rakontas en podkasto por la brita scienca revuo *Nature*, li trovis ke li “ne havis la vortojn por tiaj oftaj sciencaj terminoj kiel ‘fosilio’ aŭ eĉ ‘dinosaŭro’”. Biyela memoras sian malkuraĝiĝon. Iu ajn alia ĵurnalisto povus esti preninta la facilan solvon per zuluigo de ĉi tiuj vortoj aldonante la prefikson “i”, sed Biyela ne estis konvinkita de tiu aliro. Li finfine tradukis dinosaŭron kiel *isilwane sasemandulo*, tio estas “prabesto”. Pri la fosilioj, li elektis eĉ pli laŭvortan aliron tradukante kiel *amathambo amadala atholakala emhlabathini*, tio estas “malnovaj ostoj trovitaj en la tero”. La rakonto havas nenion esceptan. Ne havi la vortojn por trakti iujn temojn estas problemo, kiun afrikanoj alfrontas

ĉiutage. Lingve, la kontinento, kie troviĝas ĉirkaŭ 2 000 indiĝenaj lingvoj, estas preskaŭ ignorata de la scienco kaj multaj aliaj sferoj.

## Kunkonstruado

En 2019, grupo de esploristoj el la tuta kontinento formis Masakhane (en la zulu “Ni konstruas kune”). Ĉi tiu neprofitcela organizo estas “fokusita al la evoluigo de lingvaj teknikoj por afrikaj lingvoj”, laŭ klarigo de ĝia kunfondinto Jade Abbott, fakulo pri natura lingvo-prilaborado. Komence, la grupo estis plejparte formita de spertuloj pri maŝinlernado, poste ĝi plivastiĝis por inkludi lingvistojn, inĝenierojn, politikajn sciencistojn kaj komunikad-profesiulojn kiel Biyela. Disigitaj en pli ol 40 landoj, tiuj fakuloj al kutimiĝis labori interrete, do la pandemio de KOVIM-19 ne surprizis ilin.

Komence, Masakhane celis evoluigi aŭtomatajn tradukajn ilojn por granda nombro da afrikaj lingvoj. Multaj el ni opinias ke per iloj kiel *Google-Translate* ajna retpaĝo povas esti aŭtomate tradukita en nian gepatran lingvon. Sed ĝis nun, nur parolantoj de manpleno el la pli ol 2 000 afrikaj lingvoj havas aliron al ĉi tiu lukso. Estas relative facile krei maŝintradukilojn, kondiĉe ke vi havas aliron al datumoj, kiuj ege mankas en la granda plimulto de afrikaj lingvoj. Tial la Masakhane-teamo komencis montri, ke “labori en partoprena maniero, kun

virinoj kaj viroj, kiuj komprenas la ilojn kaj la lingvojn, ebligas akiri pli bonajn datumojn”, klarigas Jade Abbott. Artikolo publikigita en 2020, kunverkita de 50 Masakhane-anoj el dekoj da landoj, gajnis la Vikimedian Esplorpremion. Surbaze de la situacio de 48 el la plej parolataj lingvoj en Afriko, ĝi disponigas vojmapon por establi “normojn por maŝin-tradukado por pli ol 30 lingvoj”, kaj samtempe ebligas al homoj “sen universitata edukado fari senprecedencajn sciencajn kontribuojn”.

## Igba, svahila aŭ joruba

Post tiu ĉi unua fazo, Masakhane ekpraktikis la teorion. Ĝia tradukilo nuntempe havas prototipojn por ses afrikaj lingvoj (igba, lingala, ŝona, svahila, luba kaj joruba). Jade Abbott tamen opinias, ke tio estas la unua paŝo en longdaŭra penado. La teamo ankaŭ esploras la plej bonan manieron disponigi ĉi tiun ilon, ĉar ĉiuj implikitaj volas “certigi, ke ĝi plibonigu la vivon de komunumoj en Afriko kaj ne nutras la profitojn de grandaj ciferecaj platformoj”. Membroj de Masakhane verkis pli ol 200 universitat-nivelajn artikolojn kaj la organizo aprobis sep aliajn gravajn projektojn. Unu el ili, *Malkolonii Sciencon (Decolonise Science)*, estas kunlaboro inter *AfricaArXiv*, afrika portalo por malferme alireblaj rimedoj, kaj *ScienceLink*, malferme alirebla scienca platformo bazita en Nederlando, kun kiuj



**Ne havi la vortojn por trakti iujn temojn estas problemo, kiun afrikanoj alfrontas ĉiutage**



Biyela, la zulua ĵurnalisto, havas intensan kunlaboron.

Kiam la projekto komenciĝis en 2021, la plano estis traduki ĉirkaŭ 200 sciencajn artikolojn en ses afrikajn lingvojn. Sed alfrontinte la grandecon de la tasko, la teamo retropaŝis. Por sukcesigi tiun taskon estintus necese la kreado de centoj da neologismoj (dinosauĉo, fosilio, ktp) por ĉiu artikolo. Nun, pli realisma celo de la grupo estas traduki al tiuj ses lingvoj la resumojn de 180 verkoj (oni jam elektis la tekstojn surbaze de profunda laboro kaj analizo, kiu enkalkulis la kuntekston, la gravecon kaj la geografian kaj ĝenran diversecon de la esploroj) kaj krei nur kvin neologismojn por ĉiu artikolo.

Se la ideo "malkolonii" sugestas procezon de malkonstruado de io jam ekzistanta, por Masakhane temas pri pli ol konstruado. Laŭ klarigo de Biyela, "Multaj parolantoj de indiĝenaj lingvoj povas

## “ La manko de datumoj en afrikaj lingvoj malhelpas la disvolviĝon de maŝintradukaj iloj

paroli pri sporto, politiko kaj aliaj temoj en siaj denaskaj lingvoj, sed kiam ili ekstraktas sciencajn aŭ teknikajn temojn, ili devas ŝanĝi la leksikan registron. Tio ŝajnigas ke scienco estas fremda elemento kiu invadas la interparoladon." Tiu ĉi situacio

havas plurajn konsekvencojn, aparte sur la kampo de sankonservado. Al personoj kiuj pridubas la taŭgecon de vakcinado "vi ne povus klarigi en ilia gepatra lingvo kio estas m-RNA aŭ paroli pri imunologio". Depende de la sukceso de Masakhane, tiu ĉi situacio ŝanĝiĝos sufiĉe baldaŭ. ■

*-El la angla esperantigis  
Orlando E. Raola (Usono)*





# Subtekstado: Malantaŭ la scenoj

Se ciferecaj platformoj revoluciis la distribuadon de filmoj kaj serioj en fremdaj lingvoj, tradukistoj apenaŭ profitis de la entuziasmo de la publiko por internacia enhavo, ĉar la premio sur tempolimoj kaj salajroj pliiĝas.


Post kiam vi venkas la unu colon altan baron de subteksto, vi malkovros pli multajn mirindajn filmojn”, deklaris sud-korea direktoro Bong Joon-Ho ĉe la Premio Ora Globo en 2020. Lia filmo *Parazito* iĝis la unua ne-anglalingva

filmo gajnanta Oskar-premion en la kategorio plej bona filmo, lumigante la ŝlosilan rolon de subtekstoj por montri la vastan mondon de filmo al la tutmonda spektantaro.

La internacia sukceso de la filmo kontraŭas la onidiron, ke anglalingvanoj

ne emas legi dum ili rigardas televidajn enhavojn. *Parazito*, nun elsendfluanta sur abonbazitaj platformoj tutmonde, enspezis pli ol 50 milionojn da dolaroj en Usono kaj Kanado en sia kinejdebuta.

La fenomenala sukceso de subtekstigitaj filmoj kiel *Parazito* aŭ la



Ilustraĵo: © Nadia Diz Grana por UNESKO-Kuriero

sud-korea serio *Squid Game* (Kalmarludo) ankaŭ lumigis la malfortikan situacion de subtekstigantoj. Ĉu iliaj malbonaj laborkondiĉoj klarigas la fortan kontraston inter subteksta kvalito de spektakloj kaj filmoj por elsendfluaj platformoj? Ĉi tiu demando instigis debaton inter la ĝenerala publiko.

## Senprecedenca populareco

Post kelkaj jaroj, abonbazitaj elsendfluaj platformoj revoluciigis transliman spektantaron de eksterlandlingvaj filmoj kaj televidaj programoj, gajnante per lokalizita internacia enhavo senprecedencan popularecon inter anglalingva publiko.

Ĉirkaŭ 36% de *Netflix*-abonantoj estas el Usono kaj Kanado, kun spektantaro de ne-angla enhavo pliiĝinte je 71% ekde 2019, deklaris Bela Bajaria, estro de *Netflix Global TV*, ĉe la somera gazetara turneo de Tevid-Kritikista Asocio en 2021.

La usona giganto, kiu elsendfluigas enhavojn en pli ol 190 landoj, subtekstigis sep milionojn da elsendminutoj en 2021, kun planoj antaŭenigi tradukojn kaj fari ilin eĉ pli konvinkaj por abonantoj, deklaris Greg Peters, ĉefo pri operaciumo kaj produktoj ĉe *Netflix*. La platformo estas plejparte konsiderata de Lingvo-Servaj Provizantoj (LSPoj) kiel "pioniro" por starigi normojn pri subtekstigado kaj dublado.

## Malvirta cirklo

Subtekstigantoj tamen ne vere profitas de ĉi tiu kreskanta populareco de fremdaj enhavoj. "Ni havas ĉi tiun specon de modelo kiun oni povus nomi 'subtekstigadon kiel postpenson'. Mono por tradukado, subtekstigado, dublado kaj aliro nuntempe venas ĉe la fino de la filmkreada procezo, kiam la buĝeto por la filmo aŭ televidprogramo estas plejparte elspezita", diras Pablo Romero-Fresco, honora profesoro pri tradukado kaj filmkreado ĉe la Universitato de Roehampton en Londono.

Dum 50% aŭ pli de la plimulto de la filmaj enspezoj estas gajnitaj de iliaj eksterlandaj tradukitaj versioj, nur 0,01% ĝis 0,1% de la buĝeto estas elspezita por ili. "Ĉu la kolorkorektado de filmo, kiu alparolos milionojn da spektantoj, estas pli grava ol ĝia traduko? Tio estas ŝoka malegaleco", diras Romero-Fresco.

Subtekstigantoj estas ĝenerale pagitaj po minuto da enhavo prefere ol po subteksto. Laŭ subteksto-tradukistoj, kiuj preferas resti anonimaj, ĉi tiu pominuta taksado iom post iom malpliiĝis dum la pasintaj tridek jaroj. Alia afero estas, ke ne ekzistas normigita procezo por taskoj, kontraktoj aŭ pago, kun tarifoj kaj metodoj por kontrakti subtekstigajn servojn ege variantajn laŭ lando aŭ regiono.



## En Usono kaj Kanado, spektantaro de ne-angla enhavo pliiĝis je 71% ekde 2019

"Elsendfluaj platformoj kaj enhavokreintoj mem estas pretaj pagi por bonkvalita subtekstigado", diras Stavroula Sokoli, vicprezidanto de la Eŭropa Asocio pri Studoj en Porekrana Traduko. Tamen, ĉi tiuj enspezoj nepre atingas la tradukistojn, kio ne estas ĉiam la kazo. Foje elsendfluaj platformoj donas subtekstigajn projektojn al Lingvo-Servaj Provizantoj (LSPoj) kiuj siavice transdonas ilin al pli malgrandaj entreprenoj. Eĉ se la komenca tarifo pagita estas alta, ĝi malpliiĝas laŭ la nombro de perantoj.

"Se vi nur laboras por perantoj aŭ klientoj, kiuj pagas tre malbone, tiam vi devas labori la tutan tempon, ĉar vi ne povas vere atingi ion", diras veterana franca subtekstiganto. "Kaj se vi laboras la tutan tempon, vi ne povas havi tempon renkonti aliajn, pli bone-pagantajn klientojn. Tio povas fariĝi malvirta cirklo".

La kreskanta premo sur tempolimoj kaj salajroj instigas iujn delongajn subtekstigantojn forlasi tiun sektoron. "En la lastaj jaroj, elsendfluantoj atendas multe pli de la tradukistoj: ili atendas pli altan kvaliton, ili donas al ni iom malpli

da tempo, ili pagas al ni malpli ol antaŭe aŭ la saman, kvankam la vivokosto en la mondo ŝanĝiĝis", anonime klarigas estro de LSP.

## Pragmataj tempolimoj

Multaj fakuloj de la subtekstiga sektoro deklaras, ke subtekstigado devus esti integrita en la buĝeto je la komenco de la filmproduktada procezo, tiel ke antaŭkalkulita pago estu inkluzivita kaj taŭga LSP estu elektita dekomence. Tiu peranto siavice devus havi konvenan financadon kaj tempon por elekti taŭgan subtekstigiston. Efektive, *Parazito* de Bong Joon-Ho estis tiel fenomene sukcesa, ĉar li decidis labori kun aparte sperta subtekstiganto, Darcy Paquet, por certigi tradukon kun taŭgaj kuntekstoj kaj nuancoj.

Baldaŭ, solvo por elsendfluaj platformoj povus esti kunlaboro kun perantoj por certigi pli ĝustan pagon al subtekstigantoj kaj pli taŭgajn tempolimojn. Ĉi tiu procezo komenciĝis en Francio, kie subtekstigantoj estas pagitaj po subteksto prefere ol po minuto ĉe iuj filmoj. Elsendfluaj platformoj ankaŭ kapablas komuniki pli forte kun perantoj por ke ili pli bone pagu por tradukado.

"Francaj filmproduktantoj scias, ke ili devas eksporti al landoj, kie estas parolataj aliaj lingvoj, do plejofte ili konsideros tion de la komenco", diras Sabine de Andria, pariza tradukisto, kiu subtekstigas jam de pli ol dudek jaroj. "Se tutmondiĝo havas unu pozitivan aspekton, estas tio, ke ĝi vere evidentiĝis, ke subtekstigado kaj dublado estas esencaj kaj devas esti bone faritaj". ■

-El la angla esperantigis Jens Spillner (Germanio)



## Elspezoj pri tradukado kaj alirebleco kutime respondecas pri 0,01 elcentoj ĝis 0,1 elcentoj de la buĝeto de filmo



# La tradukisto, ĉu endanĝerigita specio?

Ekde la unuaj publikaj maŝintradukaj eksperimentoj en la 1950-aj jaroj, ni ne ĉesis antaŭdiri la triumfon de maŝino super la homo. Tamen, nun pli da homoj laboras pri tradukado ol iam ajn antaŭe. Fariĝinte tre efikaj kaj alireblaj por plej multaj homoj, interretaj traduksistemoj ne mortigis la profesion – ili transformis ĝin.

**L**a unua publika maŝintraduk-eksperimento estis en 1954. Sub la gvido de esploristoj de IBM kaj *Georgetown University* en Vaŝingtono, ĝi celis ebligi altkvalitan aŭtomatan tradukon el la rusa en la anglan ene de kelkaj jaroj. Ekde ĉi tiu unua provo, asertoj, ke maŝinoj povus baldaŭ anstataŭi tradukistojn, fariĝis ordinaraj. En 2018, *Microsoft* pretendis, ke siaj novaĵtradukoj el la ĉina en la anglan havas kvaliton kompareblan al tiu de homa traduko. La paradokso tamen estas, ke kvankam traduksistemoj estas alireblaj por plej multaj homoj, la nombro da homoj laborantaj en la tradukindustrio estas pli alta ol iam antaŭe – proksimume 600 mil homoj en la mondo. En ĉi tiu kunteksto, ĉu profesiuloj vere devas zorgi pri tio?

Fakte, la situacio estas pli kompleksa ol ĝi ŝajnas. Unue, ĉar tradukistoj mem uzas ciferecajn tradukilojn. Tiuj laborantaj pri ripetaj tekstoj verŝajne uzas tradukan memoron, laborŝparan ilon por reciklado

de tradukoj de frazoj identaj aŭ similaj al tiuj tradukitaj antaŭe. Multaj tradukistoj uzas maŝintradukon kaj post-redaktas la tekston generitan de la maŝino. Iuj tamen preferas ne uzi ĝin, taksante ke ĝi igas la laboron neinteresa kaj malbone rekompencita.

Kompreneble ekzistas tekstoj maŝintradukitaj sen ajna homa interveno. Pro tio, ke oni kreas multe pli da cifereca enhavo ol iam ajn antaŭe, estas tre malmultaj homaj tradukistoj por tiom da tradukoj. Ĝenerale, la nivelon de homa involviĝo en traduka laboro dependas de la taŭgeco de aŭtomatigo por la konservodaŭro de la teksto kaj ankaŭ de la riskoj ligitaj al la konsekvencoj de mistraduko. Tio signifas, ke la traduko de reta vojaĝrecenzo aŭ tvitero povas esti aŭtomatigitaj, dum presotaj materialoj, merkatikaj aŭ medicinaj tekstoj, ekzemple, postulas pli da homa superrigardo.

## Esperoj rompitaĵ

Ekde la fruaj tagoj de aŭtomatigo estis tendenco supertaksi la kvaliton de la rezulto. La esperoj pri maŝintradukado en 1954 kaŭzis seniluziigon kaj la aserton, ke novaĵtradukoj de 2018 samegalas al homa traduko baziĝis sur tre limigitaj taksaj kriterioj. Dum la lastaj jaroj, kompreneble, ĉi tiuj teknikoj multe progresis.

La plej fruaj sistemoj estis bazitaj sur mankodita aro da reguloj kaj dulingvaj vortaroj. En la 1990-aj jaroj oni ekuzis

homfaritajn tradukojn por komputi la plej statistike verŝajnan tradukon de fontoteksta frazo. En la 2000-aj jaroj, libera maŝintraduko populariĝis, kaj ĉirkaŭ 2016 estis salto antaŭen koncerne kvaliton, kaŭzitan de neŭr-maŝintraduko (NMT). Klopodante imiti neŭrajn retojn de homa cerbo, ĉi tiuj sistemoj klopodas krei la statistike plej verŝajnan tradukon surbaze de “trejnad-datums” – fontofrazoj kaj iliaj homaj tradukoj.

Danke al la pliigita alirebleco kaj kvalito, interretaj traduksistemoj fariĝis pli utilaj kaj popularaj ol iam ajn. En 2016, ekzemple, *Google* anoncis, ke sia sistemo *Google-Translate* kreis pli ol 143 miliardojn da tradukitaj vortoj en unu tago, kvankam la kvalito de tiuj tradukoj ne estas kontentiga.

## Mistradukoj kaj biasoj

Dum la kompleksa mekaniko de NMT-operacioj povas produkti flue sonantan eligon, ĝi povas ankaŭ generi iojn tute neatenditajn. Ili ofte estas mistradukoj de substantivoj aŭ verboj en frazo bone legebla, kiu havas malsaman signifon ol tiu de la fonta frazo. Alia kaptilo: koditaj biasoj en sistemoj povas generi supozojn pri certaj adjektivoj, kiel “bela”, “delikata” aŭ “sekseca” esti inaj, kaj adjektivoj kiel “racia”, “obstina” aŭ “simpatia” esti viraj.

Tiaj aferoj povas esti tre malfacile rekoneblaj kaj solveblaj. Krome, ambiguaj vortoj, kiuj konfuzis fruajn sistemojn, daŭre estas problemoj, kun kelkaj



**Genra antaŭjuĝo en maŝintradukado povas esti tre malfacile detektebla**

halucinoj kaŭzinte amaskomunikilajn tumultojn. Raporto de 2018 rivelis ekzemplojn de *Google-Translate* tradukanta hazarde kombinantaj literojn en tekstoj kiuj similas al religiaj profetaĵoj.

La intenco de la aŭtoro kaj la celo de la teksto ne povas esti koditaj en maŝintradukan sistemon, kiu forigas leksikan riĉecon kaj normigas la tekston surbaze de la plej oftaj vortoj de siaj trejnaj datumoj. Precipe por kreemaj tekstoj, ajna spuro de la voĉo de la aŭtoro perdiĝos.

## Redukti kostojn

Kvankam limigita, tamen maŝintraduko estas ofte uzata kaj ĝia reviziado fariĝis parto de ĉiutaga laboro de multaj tradukistoj: homnivela kvalito kaj monŝparo signifas, ke maŝintraduko foje estas uzata aŭ aldonita al la laborfluo de tradukistoj. Ĉar plejparto de la tradukistoj estas liberlaborantoj, estas malfacile por ili oponi tiun praktikon. Ekzemple, multaj subtekstigaj laboroj implikas reviziadon de maŝintradukaĵoj

por ŝpari kostojn kaj fruigi limdatojn – kaj ofte rezultas en plendoj de spektantoj pri la traduka kvalito. Rilate al maŝintraduko de literaturo, d-ro Ana Guerberof Arenas, profesoro pri Tradukado kaj Plurmodalaj Teknikoj ĉe la Universitato de Surrey en Britio, lastatempe raportis ke, kvankam legantoj povas kompreni la maŝinan tradukon, ili malpli engaĝiĝas en la rakonto kaj preferas la homan tradukon.

Resume, maŝintraduko povas esti efika kaj utila – kun aŭ sen homa interveno. Malgraŭ tio, estas risko, ke

forte aŭtomatigitaj laborprocezoj povas igi tradukan profesion malpli alloga. Tio estas zorgo pri la daŭripoveco de ambaŭ, maŝina kaj homa traduko. Tamen ni devas atenti pri io grava: kiel rimarkis profesoro Dorothy Kenny de la Lernejo de Aplikaj Lingvoj kaj Interkulturaj Studoj ĉe Dublina Urba Universitato (Dublin City University) en Irlando, koncerne la eblecon ke maŝintraduko anstataŭos homajn tradukistojn, la unua dependas de la lastaj por havi trejnajn datumojn kaj legitimecon. ■

*-El la angla esperantigis Jens Spillner  
(Germanio)*

“

**La intenco de la aŭtoro ne povas esti kodita en maŝinan traduksistemon**



Ilustraĵo: © Adria Fruits por UNESKO-Kuriero



# Koralrifoj: Kroniko de fragila mondo








Scienca projekto sub la egido de UNESKO esploras unu el la plej grandaj koralrifoj en la mondo, ĉe la marbordo de Tahitio.









**Ĝ**i estas unu el la plej grandaj koralrifoj en la mondo, disvolvante siajn florojn je preskaŭ tri kilometrojn longa etendiĝo, kaj ĝi estas ankaŭ unu el la plej profundaj.

Ĉi tiu submara trezoro estis jam delonge konata de lokaj fiŝkaptistoj, sed neniu imagis, ke ĝi povus esti tiom vasta. Post submara ekspedicio, efektivigita per subteno de UNESKO en 2021, la franca esploristo kaj fotisto Alexis Rosenfeld donas al ni eksterordinarajn bildojn de tiu pejzaĝo.

Kontraste al multaj aliaj koralrifoj, ĉi tiu ne estas trafata de koral blankiĝado, la plago, kiu voras plejmulton de la rifoj. Preskaŭ duono de la koralrifaj ekosistemoj malaperis ekde la 1870-aj jaroj pro klimatsanĝiĝo, troa fiŝkapatado kaj poluado. Inter la postvivantoj, triono riskas malaperi.

Ĝi estas nur proksimuma takso, ĉar ĝis nun nur 20 procentoj de la marfundo estas mapita. Pro tio UNESKO planas mapadi almenaŭ 80 procentojn de la oceana grundo ĝis la jaro 2030. La pliprofundigo de nia sciado pri la marfundo povus iutage malkaŝi la ekziston de aliaj ekosistemoj, kapablaj adaptiĝi al la kreskantaj oceanaj temperaturoj. ■

**-El la angla esperantigis Frank Lappe  
(Germanio)**

Supre: La franca esploristo kaj fotisto Alexis Rosenfeld, fondinto de la kampanjo Unu Oceano, efektivigita en partnereco kun UNESKO por kreskigi la publikan atenton pri la bezono de konservado de la oceano.


Maldekstre: Por kapti lumon, kiu estas rara en 30-metra profundo, la koraloj de ĉi rifo malfermiĝas kiel rozpetaloj.



Malsupre: La insularo Maldivoj. Du karnovoraj asterioj (*Acanthaster planci*) formanĝas koralan kolonion. Ĉi specio estas la ĉefa natura kaŭzo de la malapero de koraloj.



Malsupre: Naturparko de la Korala Maro en Nov-Kaledonio, Francio. Alkroĉigante al gorgonoj, krinoidoj kaptas planktonon helpe de siaj longaj flekseblaj brakoj. Ĉi tiu specio loĝas en la oceano de proksimume 500 milionoj da jaroj.







Supre: Ĉi tiuj koraloj estas instalitaj de sciencistoj de la franca laboratorio CNRS-CRIOBE ĉe la marbordo de Moorea (Franca Polinezio) por studi la efikojn de tutmonda varmiĝo sur koraloj.


Dekstre: La aktinio *Entacmaea quadricolor* ofte estas enloĝata de klaŭnfiŝoj. Jen, en la Naturparko de Tubbataha-Rifoj en la Filipinoj.











La Gambier-insuloj en Franca Polinezio. La Rikitea-laguno estas la hejmo de impresa kolonio de fungokoraloj (*Fungia scruposa*), kiuj kapablas moviĝi.





Maldekstre: Salpa kolonio en la Mediteraneo. La vivociklo de ĉi specio havas du fazojn: La unua estas soleca kaj karakterizita de neseksa reproduktado; la dua estas kolektiva, kun seksa reproduktado.

Malsupre: Plasta saketo ligiĝis al la brusta naĝilo de long-muzela delfeno (*Stenella longirostris*). Rubaĵo ne memdegradebla kaŭzas seriozan danĝeron al la mara faŭno.





Supre: Liparaj Insuloj (Italio) en la Mediteraneo. La Fumanta Lando estas submara regiono malkovrita en 2018 inter la insuloj Panarea kaj Basiluzzo. Ĝi konsistas el pli ol ducent vulkanaj tuboj, kiuj eligas gas-riĉajn acidajn likvaĵojn.



Tahitio en Franca Polinezio. La griza rifa ŝarko (*Carcharhinus amblyrhynchos*) naĝas grupe dumtage. Tiuj grupoj apartiĝas nur por dumnokta ĉasado.





Akcipitrobeka martestudo (*Eretmochelys imbricata*) en la maro de la Naturparko Tubbataha-Rifoj en Filipinoj.



Erupcio de hidrogena sulfido en la centro de la Panarea-vulkankratero, ĉe Sicilio. Ĉi regiono en la Mediteraneo estas vulkane aktiva.





La Majota Mara Naturparko (Francio) en la Hinda Oceano. Kiel ligilo inter lando kaj oceano, la mangrovo mildigas la forton de ondoj kaj servas kiel natura filtrilo.



IDEOJ





# Diru al mi kion vi manĝas kaj mi diros al vi kiu vi estas

Nia intereso pri la manĝo ne montras signojn de malkresko. Tio estas evidenta laŭ la proliferado de libroj, programoj, filmoj, kaj serioj pri la temo, dum la kuiristoj estas traktataj kiel famuloj. Ĉi tiu fenomeno de gastrolatrio reflektas la profundajn ŝanĝojn, kiuj difinas novan mondan manĝordon.

**L**a ago manĝi estas regata de principo pri ensorbado. La manĝaĵo, kiun ni englutas, havas konkretajn biokemiajn efikojn en la korpo. Tial ni laŭvorte estas tio, kion ni manĝas. Sed tiu aforismo funkcias ankaŭ en la alia direkto – ni manĝas tion, kio ni estas. Ĉar kiam ni manĝas, ni ensorbas ne nur nutraĵojn, sed ankaŭ simbolojn kaj signifojn. Ĉiuj kulturoj atribuas specifajn signifojn al siaj manĝaĵoj – estas ĉiutagaj pladoj kaj festaj pladoj, ĉefmanĝaĵoj kaj lunĉoj, aĵoj, kiuj estas manĝataj kaj aĵoj ne manĝataj. Manĝaĵo ne nur teksas reton da signifoj, ĝi estas ankaŭ centra trajto de kolektiva kaj individua identecoj.

Laŭlonge de la pasintaj tridek jaroj tiuj identecoj evoluis, kreante paradoksajn manĝ-sintenojn. Tiu “nova manĝ-ordo” fakte estas okupata de du opoziciaj movadoj. Unuflanke, ni atestas la tutmondiĝon de samnormigita dieto – ofte nomata “Okcidenta” – bazita en abundo de viandaj produktoj kaj prilaboritaj manĝaĵoj, rafinitaj sukeroj, saturitaj grasoj kaj karbonhidratoj. Aliflanke, pli individuaj dietoj ekaperas,

kreante mozaikon da partaj tendencoj, “laŭmenuaj” manieroj manĝi.

Tiu partikularismo havas la efikon apartigi nin disde tradicioj, tiel ke ni povas havi aktivan rolon en la decido pri niaj propraj manĝkutimoj. La kompleksa konsumanto en nia tempo estas kapabla konscie manipuli simbolajn signifojn kun la specifa celo ellabori sian propran identecon. Ĉar konsumado grandparte difinas nian vivostilon nuntempe.

## La rito de la familia manĝo

Malmultaj aktivajoj estas tiel ĉiutagaj kiel la ago manĝi. Eĉ tiel, tiu ripeta agado pli kaj pli survojas al teatro de la intimeo.

La rito de kunmanĝado kiel familio ĉirkaŭ la tablo antaŭ televidilo nun estas grandparte pasintaĵo. Kun la plinombriĝo de ekranoj, manĝokutimoj fariĝas pli fragmentaj. Nemaŭte oni vidas membrojn de sama familio vespermanĝantaj, ĉiu antaŭ sia propra ekrano kaj kun sia individua manĝaĵo, plado el vegetaloj por la vegetarano, senglutena manĝaĵo por la celiakiulo, vitamin-suplementoj por la sportulo, apenaŭ

“

**Kiam ni manĝas, ni ensorbas ne nur nutraĵojn, sed ankaŭ simbolojn kaj signifojn**

varmigita pretmanĝaĵo por tiu, kiu malhavas tempon aŭ emon kuiri.

La diverseco de manĝmanieroj rivelas distanciĝon de kuirtradicioj, kiuj iam donis kolektivajn identecojn al pluraj regionoj kaj landoj en la mondo. Multaj nuntempe manĝas malsame ol iliaj geavoj, eĉ ol iliaj gepatroj. Tamen tio ne signifas, ke kolektivaj identecoj dissolviĝas, ili simple ŝanĝiĝas. Per la adopto al specifa dieto, individuoj disvolvas identecojn, kiuj transcendas familion, regionon aŭ landon, por esti parto de retoj de transnaciaj komunumoj.







▼ Por sia projekto Pano ĉiutaga, la usona fotisto Gregg Segal vojaĝis tra la mondo serĉante komunumojn, kies tradiciaj dietoj rezistas al la frapo de tutmondiĝo. Li petis infanojn registri en taglibro ĉion, kion ili manĝas en unu semajno kaj faris fotojn de ili ĉirkaŭataj de la manĝaĵoj, kiuj konsistigas ilian semajnan menuon. Fotoj de © Gregg Segal

## Retuma manĝado

Samtempe kunmanĝado – la maniero kiel manĝo estas kundividita – riĉiĝas pro novaj praktikoj. Antaŭ kelkaj jaroj, fenomeno nomata *mukbang*, korea termino, kiu miksas “manĝi” kaj “elsendi”, naskiĝis en iuj aziaj randoj. Tiu praktiko konsistas el la manĝado de foje impresaj kvantoj da malsamaj manĝaĵoj antaŭ kamerao dum intergado kun konektita spektantaro. Ĉar multaj manĝas solaj, tiu fenomeno povas esti respondo al la bezono inventi novan, virtualan kunmanĝadon. Nuntempe ni manĝas ankaŭ en retoj.

La partikularigo de dieto ofte estas afero pri elekto. La individuo decidas ĉu esti vegetarano aŭ ĉiomanĝanto, manĝi ekologiajn, lokajn aŭ sezonajn kultivaĵojn, ĉu manĝi malsanigan sed plezurigan manĝaĵon, ĉu esti delikatulo aŭ sentoksiganto. La kialoj

por tiuj elektoj povas esti moralaj aŭ diktataj de la bezono adapti dieton pro malsanoj, maltolereco aŭ malakcepto de manĝaĵoj. Ili ankaŭ rivelas medicinigon de la manĝaĵo. Konforme al la ekonomia logiko, kiu provas komercigi ĉiun aspekton de la vivo, iuj merkataj agentoj transformis iujn manĝaĵojn al “kuraciloj”,

kiuj batalas kontraŭ malsanoj, faciligas digeston, estas antioksidantoj aŭ plilongigas la vivon.

## Pliriĉigante la travivaĵon

Efektive, manĝi fariĝis travivaĵo. La kontentigo de tiu deziro fariĝis pli kaj pli aventuro de la individuo, en kion homoj investas sian monon, sian kulturalan kapitalon kaj precipe la serĉadon de sia propra identeco.

La kulturo de konsumantoj instigas al ekzoteco kaj noveco. Luj produktoj tial ekhavas pli grandajn ekonomiajn valorojn se ili eniras la sferon de konsumado kie ili ricevas etiketojn ligitajn al la retoriko de aŭtentikeco, kiel “etna”, “metia”, “hereda”, aŭ “natura”. Ekzemploj inkluzivas kinuon el Andoj, teon Pu’er el la ĉina provinco Yunnan, tradician fromaĝon el la Pireneoj kaj viandon el la naturaj paŝtejoj de Urugvaĵo.

“  
**Manĝo-sinteno,  
 centra en  
 kolektivaj kaj  
 individuaj  
 identecoj, estas  
 ŝanĝiĝanta**”





▣ Majo Said, 7-jaraĝa, Hamburgo, Germanio, 2017. ▣ Kawakanih Yawalapiti, 9-jaraĝa, regiono Alta Ŝinguo en la brazila ŝtato Mato Grosso, 2018. ▣ Altat Rabbal DLove Bin Roni, 6-jaraĝa, Gombak, Malajzio, 2017. ▣ Sira Cissokho, 11-jaraĝa, Dakaro, Senegal, 2017.

En la sama senco, turismo ebligas unu el la plej dinamikaj formoj de franduligo kaj kontentigo de la bezono de ekzoteco. Vojaĝantoj havas la ŝancon ĝui vastan gamon de unikaj gastronomiaj travivaĵoj. Laŭ tio, kreskanta nombro da landoj engaĝis sin al la tiel nomata “gastrodiplomatiko”, strategio, kiu uzas lokajn manĝaĵojn kiel logilon por vizitantoj. Tiu strategio funkcias laŭ du manieroj por stimuli la ekonomion kaj lokan disvolviĝon. Tio ne nur allogas turistojn al la lando, sed ankaŭ donas al ĝiaj produktoj kaj ĉefkuiristoj videblan markon, kiu funkcias kiel etikedo pri kvalito eksterlande.

Tamen la franduligo povas okazi tra pli metiaj procezoj. Antaŭ la amasigo de varoj normigitaj de la industrio, la homoj nun serĉas produktojn, kiuj elstaras. En la hodiaŭa socio, kuirado fariĝis konsumobjekto – ne plu peza hejmtasko, sed ŝika kaj distra ŝatokupo. Kultivi

“  
Ni atestas la  
tutmondigon de  
normigita dieto

vegetalojn por la propra konsumado, akiri justkomercajn kafograjnojn, preferi ekologiajn produktojn aŭ prepari hejme faritan kombuon estas pli ol nur frandula sinteno. Tra tiuj formoj de krea konsumado, la manĝaĵo esprimas ankaŭ estetikajn, politikajn kaj precipe identecajn poziciojn.

Tiuj novaj praktikoj ne okazas sen iuj kromefikoj. Kiam kinuo eniris la frandulan merkaton, ekzemple, indiĝenaj komunumoj en la Andoj, kiuj havis tiun semon kiel bazon en la dieto, vidis grave

minacata sian aliron al tradicia manĝaĵo. Intertempe, la medicinigo de manĝaĵo estas grandparte iluzia, eĉ misgvida. Alia kaptilo estas tio, ke la detruo de kunmanĝado korodas la sociajn ligojn, kiujn la kundivido de manĝaĵo fortigas.

Malgraŭ tiuj limigoj, kuirarto estas rimarkinde rezistema, konstante kapabla reinventi sin. Ĝi restas la centro de socia vivo kaj plu forĝas identecojn. Ĝi restas kundividita kodo – materio kaj nun virtuale – kaj tre pova sistemo de komunikado. ■

**-El la angla esperantigis James Rezende Piton (Brazilo)**



# Joanne McNeil:

## “Interreto ne estas limigita de tio, kion teknikaj kompanioj faris el ĝi.”

En sia libro *Kaŝnavigado: kiel homo fariĝas uzanto (Lurking: How a Person Became a User)*, la usona verkistino Joanne McNeil revizitas la historion de interreto el la vidpunkto de ĝiaj uzantoj. Per kritikado al la rakontoj foje idealigitaj de la komenco de la Tutmonda Reto, ŝi pledas por Interreto bazita ne nur sur komercaj rilatoj.

**Vi verkis vian libron pri la historio de la reto el la vidpunkto de uzanto. Kial vi elektis ĉi tiun perspektivon?**

Oni ĝenerale konsideras la uzanton kiel “nefunkulon”. Homo kiu ne laboras por la grandaj teknikaj kompanioj estas taksata kiel nescianto pri tio, aŭ la maniero kiel ili funkcias. Tamen ni, la uzantoj, havas ĉiutage la konkretan sperton de la interretaj servoj, kiujn ili proponas. Ĉi tiu perspektivo malofte estas elvokita kiam oni parolas pri teknologio. En mondo, kie nun estas neeble rezigni pri interreto, la fakto, ke ni devas strukturi niajn vivojn

“

**Kelkaj el la komencaj promesoj de interreto estas ankoraŭ aktualaj**

ĉirkaŭ ĉi tiuj programaroj kaj ne rajtas diri nian opinion pri ilia evoluo, levas demandojn.

**Kiel la interreto evoluis de kiam ĝi komenciĝis? Ĉu la ideo de interreto kiel utopio por universaligi la aliron al scioj estas forlasita?**

En mia libro, mi kontraŭbatalas la senton de nostalgio, kiu aperas en konversacioj pri la komenco de interreto. Kompreneble komence eblis por interretaj uzantoj interŝanĝi informojn preter distancoj kaj sen devo aliĝi al kompanio, sed oni, tamen, ne devas idealigi la situacion. Sufiĉas iri al iu ajn diskutejo de la komenco de la interreto por konstati, ke ĉikanado, sekteco kaj diskriminacio jam estis tie. Cetere, por esti konektita en la 1980-aj jaroj, oni devis havi komputilon tre altkoston. En la 1990-aj jaroj, kiam la TTT (Tut-Tera Teksaĵo) estis lanĉita, la cifereca breĉo jam estis evidenta.

Samtempe, entreprenoj akiris grandajn investojn por krei platformojn

por sociaj retejoj. Luj kompanioj kiel *Twitter* kaj *Facebook*, kiuj komence estis tre malgrandaj strukturoj, spertis grandegan kreskon, kaj nun ŝajnas preskaŭ neimageble vidi ilian influon malpliigi. Ĉio ĉi okazis tre rapide, en tempo kiam rilataj regularoj apenaŭ ekzistis.

Kvankam oni povas seniluziigi pri tio, kio fariĝis la interreto hodiaŭ, kelkaj el la originaj promesoj ankoraŭ validas. Ĉi tiuj retaj ejoj restas nekompereblaj iloj por kunigi homojn kaj komunumojn, kiel tio, kio okazis ĉe Amazon-dungitoj batalantaj por defendi siajn rajtojn, aŭ ĉe komunumoj de homoj suferantaj pro la sama malsano.

**Ĉu vi vidas ŝlosilajn momentojn en la historio de TTT? Kiam homoj komencis fariĝi uzantoj?**

Tio, kion ni nun nomas “sociaj retoj”, akcelis la ŝanĝon de persono al uzanto. La periodo de la 2000-aj jaroj, kolektive nomata “Interreto 2.0”, estas la tempo de amasa alprenado de interreto ne nur fare de individuoj, sed ankaŭ de lernejoj kaj laborejoj. Tiam ni






Joanne McNeil

Verkisto, redaktisto kaj  
artkritikisto, Joanne  
McNeil interesiĝas  
pri kiel teknologio  
fasonas la kulturon  
kaj la socion.








ekalkutimiĝis sekvi homojn kaj havi amikojn kaj abonantojn en interreto.

Ĉi tio estas grava diferenco kompare kun la 1990-aj jaroj, kiam la interretaj uzantoj kutimis interveni anonime kaj la grupoj disvolviĝis per volontulaj agoj de uzantoj de interreto. Ili tiam estis ligitaj al certa nombro da membroj,

kaj estis parto de ilia komunumo, kiuj interagis kiel homoj kaj ne nur kiel abstraktaj uzantoj. Ĉi tiuj fruaj retejoj kaj forumoj ankaŭ estis regataj de partopren-reguloj specifaj por ĉiu komunumo, kaj subtenataj de valoroj, kiujn ĉiuj kundividis ene de ĉiu komunumo.

Tiam aperis novaj platformoj kreitaj per la aŭtomata grupigo de ĉiuj rilatoj de unu persono en la reto. Ĉi tio tradukiĝis en kontakto kun fremduloj, kies identeco estis klare certigita ĉar iliaj fotoj, loko, interesoj kaj ligiloj kun ili fariĝis videblaj.





Ilustrajo: © Boris Séménako por UNESKO-Kuriero

*Facebook*, ekzemple, estis komence rezervita por studentoj, sed ĝi poste estis malfermita al kiel eble plej multaj homoj. Estis tiam ia respondeco pro la fakto, ke ĉiuj estis parto de samaj sociaj grupoj.

Hodiaŭ, la fondintoj, gvidantoj kaj programistoj de retaj platformoj de ĝenerala intereso mem ne nepre estas uzantoj. Kiam okazas tiel, ili uzas ĉi tiujn retajn sistemojn en malengaĝita maniero. Krome, uzanto havas tre malmulte da ŝanco esti aŭdata, se tiuj iloj pruviĝas malutilaj al li. Ĉi tiu ŝanĝo estas reprezenta de la 2000-aj jaroj: la modelo distanciĝas de vera komunumo, en kiu kreintoj kaj programistoj estas parto de ĝi kaj vigligas ĝin per propra engaĝiĝo.

Pro tio mi pensas, ke en interreto oni devus kuraĝigi la disvolviĝon de malgrand-skalaj organizitaj grupoj, kiel komunumoj. Tio faciligus la efektivecon de moderigaj politikoj agnoskataj de ĉiuj, kvankam ne nepre plaĉaj al ĉiuj.

En malgranda komunumo, ni povas admoni membrojn pri tialaj agoj. Eble la uzanto malakceptos tion kaj emos forlasi la grupon, alie pensos pri sia konduto. Temas pri kondutoj kaj spertoj, kiujn ni povas regi etskale – en klasĉambro, en laborejo, ĉe festo – sed kiuj estas multe pli malfacile reguligeblaj tutmonde.



## La evoluo de etskalaj komunumoj devus esti kuraĝigita en interreto

### ***Vi kulpigas la grandajn teknikajn kompaniojn. Kial vi riproĉas ilin?***

Miaj ĉefaj zorgoj estas la ekspluatado de informoj, la malrespekto al privateco kaj la influo nun ĝuata de ĉi tiuj grandaj teknikaj kompanioj pro la kapitalo kolektita de ili. Fakte, multaj homoj nun konsideras, ke interreto nepre estas tia kaj ne ekzistas alternativoj. Mi rekomendas, ke oni esploru pri la historio de interreto, kiu estas markita de la kreado de servoj, kiuj estas parto de nia ĉiutaga vivo kaj ne estis kreitaj por monprofito, kiel retpoŝto. Ili povas servi

kiel modeloj por alternativa interreto, bazita ne nur sur komercaj rilatoj.

### ***Vi rekomendas efektivecon de interretaj kondut-reguloj por ke oni digne traktu kaj vivantajn kaj mortintajn homojn. Kial?***

Kion oni faru pri la spuroj postlasitaj de ni en la interreto estas kompleksa demando, kiu ja meritas esti diskutata. Iuj argumentas, ke tiuj spuroj konsistigas arkivojn, kaj ke estas grave konservi ilin. Sed ĉu vere necesas konsideri ĉiujn niajn retajn spertojn por kompreni la 21-an jarcenton? Se jes, kiuj estas la plej gravaj informoj konservindaj? Ni ne havas kopion de ĉiuj neformalaj interparoloj de la 19-a jarcento, ĉu tio estas problemo?

Estus dezirinde demandi uzantojn pri ilia konsento kaj interkonsenti pri kiel forigi la datumojn kaj informojn en respektama maniero por ilia komunumo. *MetaFilter* estas reta sistemo, kiu faras bonegan laboron en ĉi tiu direkto. Ĉi tiu estas unu el la plej malnovaj retaj komunumoj, kiu estas strukturita de la homoj kiuj partoprenas ĝin. Multaj uzantoj de *MetaFilter* pensas pri la konsekvencoj de arkivado de datumoj kaj informoj de uzantoj laŭlonge de la tempo en interreto.

### ***Kiel eblus plifortigi la protekton de privateco kaj antaŭenigi la konsenton de uzantoj?***

Ĉi tio devus okazi per regularo. La retaj sistemoj volas kredigi al ni, ke ili povas memreguliĝi, sed tio, kio okazis dum dudek jaroj montras, ke ĉi tio ne okazas. Mi pensas, ke la milionoj da homoj, kiuj uzas interreton ĉiutage, interesiĝas pri la protekto de ilia privateco. La generacioj naskitaj kun la interreto konscias pri tio, kion ili donas kaj tio, kion interreto prenas de ili. Ili ankaŭ scias, ke ĉi tiuj interŝanĝoj estas maljustaj. Tio igas min optimisma: la plejmulto de ĉi tiuj interretuloj volas, ke aferoj ŝanĝiĝu en ĉi tiu kampo. La ekzisto de alternativo – eĉ se tre malgrandskala – al la grandaj platformoj estas, miaopinie, progreso, ĉar ĝi montras al ni tion, kion la interreto ankoraŭ povas fari. Interreto ne estas nur *Facebook*. Interreto ne estas nur TTT. Interreto ekzistas ekster tio, kion kompanioj faris el ĝi. ■

***-El la angla esperantigis James Rezende Piton (Brazilo)***

### ***Vi distingas du klasojn de malsamaj homoj: uzantoj kaj programistoj. Kio estas la diferenco inter ili?***

Ĉe la komenco de la interreto, retaj komunumoj estis kreitaj de homoj, kiuj ankaŭ estis ĝiaj membroj.



# Subtera akvo: Ĉu antidoto por la krizo de akvo?

**L**a kreskanta uzo de akvo kune kun la pliigita premo sur surfacaj akvoresursoj faras tutmondan akvan krizon neevitebla – krom se ni ekuzos la plenan potencialon de subteraj akvorezervoj, kiuj ofertas grandegan provizon de dolĉakvo.

Subtera akvo respondecas pri 99 elcentoj de la tuta likva dolĉakvo sur la Tero, sed nuntempe kovras nur kvaronon de niaj bezonoj. Tamen, ĉi tiu natura rimedo estas konstante subtaksata, misadministrata kaj eĉ misuzata. La plej nova eldono de la Evolua Raporto pri Monda Akvo de Unuiĝintaj Nacioj, *Subtera akvo: videbligi ion nevideblan*, publikigita de UNESKO la 21-an de marto 2022 nome de UN-Akvo, lumigas la potencialon de ĉi tiu abunda rimedo por plenumi niajn bezonojn, se ni daŭripove uzos ĝin. ■

*-El la franca kaj angla esperantigis Kim Ribeiro (Brazilo)*



## MAPADO DE SUBTERA AKVO



Tutmonde, estas atendata kresko je proksimume **1% jare dum la venontaj 30 jaroj.**



Oni kalkulas ke **4 miliardoj da homoj** vivas en areoj kiuj suferas severan akvomankon dum almenaŭ unu monato jare.



Homoj ĉerpas proksimume

**1 000 km<sup>3</sup>**

da subtera akvo jare, **kresko je ĉirkaŭ 2% ĉiujare dum la pasintaj du jardekoj.**

Ĉi tiu kvanto ekivalentas al



de la dolĉakvo kolektita por homa uzo.




# TUTMONDA POSTULO PRI SUBTERA AKVO

Subteraj akvujoj estas replenigitaj ĉefe per **pluvo kaj neĝo infiltrantaj la grundon.**



Akvo estas la plej grava krudmaterialo uzata en bierfarado: ĝi konsistigas



**de la biero.**

El ĉiuj naturaj resursoj, **subtera akvo estas la plej ĉerpita rimedo en la mondo.**




de ĉi tiu resurso **estas uzataj por agrikulturaj celoj.**



La moda industrio nuntempe uzas akvon kies kvanto estas sufiĉa por kvietigi la soifon de **110 milionoj da homoj dum tuta jaro.**

Por produkti nur unu kotonan T-ĉemizon oni uzas proksimume **2 500 litrojn da akvo.**



de la tuta akvo uzata por irigacio en kultivado de cerealoj **venas el subteraĵo.**

**44%**

## de la usona loĝantaro

dependas de subtera akvo por ilia provizo de trinkakvo.



## Pli ol 90% de subtera akvo en Barato

estas uzata por agrikultura irigaciado.

## Subtera akvo en Francio:

Hejma akvoprovizado:

**66%**

Agrikulturo:


**37%**

Industrio:

**31%**

## Ĉefaj kvin landoj

laŭ kolektado de subtera akvo en 2010:





## KIEL KAJ KIE ONI UZAS SUBTERAN AKVON?

### Kaptado de subtera akvo

69%



de totala kaptado de subtera akvo estas por **agrikulturo**.

22%



estas por **hejma uzo**.



9% estas por **industrio**.

Oni taksas ke proksimume **50%**

de la urba loĝantaro en la mondo **estas provizata per akvo el subteraj akvofontoj**.

Inter **15% kaj 25%**

da subterakva kolektado originas **el fontoj ne-renovigeblaj**.

### Regionoj tre dependaj de subtera akvo por irigacio

Nord-Ameriko  
**59%**

areoj ekipitaj por irigacio kiuj **uzas subteran akvon**.

Suda Azio  
**57%**

Afriko Subsahara

**3%**


de la agroj estas ekipitaj por irigacio.

**Nur 5%**


de ĉi tiu surfaco uzas **subteran akvon**, spite al la vastaj malprofundaj akvrezervujoj, grandparte subutiligitaj.

# SUBTERA AKVO POVAS ESTI UTILA EN LA BATALO KONTRAŬ KLIMATŜANĜIĜO, SED POR TIO, NI DEVAS PLI SAĜE UZI ĜIN

Humidejoj sorbas **CO<sub>2</sub>** el la aero.



La vegetajaro ŝirmas kontraŭ **inundo kaj erozio**.



**Pluvakvo povas esti konservata**

por ĉiutaga uzo dum seka sezono kaj tiel povas redukti dependecon pri subteraj kaj surteraj akvofontoj.




**Subtera akvo povas esti reuzata**

Tiel oni evitas akvomalŝparon.



**Agrikulturo adaptita al klimatsanĝiĝo**

povas pliefikigi la agrikulturan uzon de akvo.



## KIEL NI POVAS PLI SAĜE UZI LA GRANDAN SUBTERAKVAN POTENCIALON?

Ni devas produkti kaj kunhavigi pli da datumoj kaj scioj pri la trajtoj kaj ecoj de subteraj akvosistemoj por:

**1** Taksi la kvanton kiun ni povas preni, kie kaj kiam, sen kaŭzi trostreĉon kaj elĉerpiĝon de ĉi tiu rimedo.

**2** Eviti poluadon de subtera akvo, precipe per protektado de grundo kaj ekosistemoj en replenigaj areoj de subteraj akvorezervujoj, kiuj povas esti fontoj de poluado.

**3** Certigi **justan aliron** al (kaj profiton de) subtera akvo.



# Novaj eldonaĵoj



## Mondaj heredaĵoj n-ro 101

Novaj Lokoj

ISSN 1020-4202

88 pp., 220 x 280 mm, poŝlibro, €7.50

UNESKO-Eldonejo/Publishing for Development Ltd.

Numero dediĉita al la plej novaj aldonoj al la listo de Mondaj Heredaĵoj, inkluzive de la Nacia Parko Ivindo de Gabono, la Trans-Irana Fervojo de Irano, la Arbara Komplekso de Kaeng Krachan de Tajlando kaj la Lumturo de Cordouan de Francio.

Dum sia 44-a sesio, la Mond-Heredaĵa Komitato taksis ne nur la proponojn pri Mondaj Heredaĵoj prezentitaj en 2021, sed ankaŭ tiujn de 2020: tridek kvar novaj lokoj, dudek naŭ kulturaj kaj kvin naturaj, estis enskribitaj; tri antaŭe enlistigitaj estis plivestigitaj. Ĉi tio plimultigas la totalan nombron de la ejoj en la listo de Mondaj Heredaĵoj de UNESKO al 1 154.



## Tutmonda Raporto pri Kontrolado de Edukado 2021/2

Neregistaraj agantoj en edukado: Kiu elektas? Kiu perdas?

ISBN 978-92-3-100506-0

474 pp., 215 x 280 mm, poŝlibro, €55

UNESKO-Eldonejo

La rolo de neregistaraj agantoj etendiĝas super provizo de instruado al intervenoj en diversajn edukajn nivelojn kaj influferojn. Per analizo de la progresoj kadre de la kvara Daŭripova Evoluiga Celo (Sustainable Development Goal 4), inkluzive de aperantaj indicoj pri influo de la pandemio de KOVIM-19, la Tutmonda Raporto pri Kontrolado de Edukado 2021/2 instigas registarojn rigardi ĉiujn instituciojn, studentojn kaj instruistojn kiel parto de ununura sistemo. Normoj, informoj, instigoj kaj respondecoj devus helpi registarojn protekti, respekti kaj plenumi ĉies rajton je edukado, sen ignori privilegiojn aŭ ekspluatadon.



## Re|Formi Politikojn por Kreivo

Pritrakti kulturon kiel tutmondan publikan bonon

ISBN 978-92-3-100503-9

332 pp., 215 x 280 mm, broŝurita, €55

UNESKO - Eldonejo



La serio Tutmondaj Raportoj kontrolas la efektivigon de la Konvencio de UNESKO pri Protekto kaj Progresigo de la Diverseco de Kulturaj Esprimoj en 2005, samkiel progreson al realigo de la Agendo 2030 por Daŭripova Evoluigo de Unuiĝintaj Nacioj, ene de kaj kun la kulturaj kaj kreivaj sektoroj.

Ĝia eldono en 2022 tuŝas du ĉefajn demandojn: kia estas la stato de la kultur-kreiva sektoro? Kiuj politikaj ŝanĝoj por antaŭenigi daŭripovajn homajn rajtojn bazitajn sur sistemoj de regado por kulturo kaj justa aliro al kulturaj ŝancoj kaj resursoj rezultis de efektivigo kaj proprieto de koncernatoj de la Konvencio?

*-El la angla esperantigis Xie Ruifeng (Ĉinio)*

# Multaj voĉoj, unu mondo

UNESKO-Kuriero aperas en ses oficialaj lingvoj de la Organizo, kaj ankaŭ katalune, Esperante, kaj koree.



## Abonu la presitan version

1 jaro (4 numeroj) : 27€ 2 jaroj (8 numeroj) : 54€

Afranko: 9 eŭroj (1 numero)

- 1 Membro de UEA, bonvolu pagi al nia konto ĉe UEA (celi-p)
- 2 Se vi ne estas membro de UEA, bonvolu pagi 66 svisajn frankojn jare aŭ 132 svisajn frankojn por du jaroj al jena konto: PostFinance, Nomo: LIU JUN, IBAN: CH98 0900 0000 3048 76172 Post via ĝirado, bonvolu informi min ĉe lamondo@163.com

<http://www.espero.com.cn/>; <http://esperanto.china.org.cn/>;  
<https://en.unesco.org/courier/subscribe>

## Abonu la bitversion



Ĝi estas  
100%  
SENPAGA



# La sekvaj 50

En 2022, UNESKO celebras la 50-an datrevenon de la Konvencio pri Monda Heredaĵo sub la temo: “Monda Heredaĵo kiel fonto de fortikeco, humaneco kaj novigo”.

Aliĝu ĉe [whc.unesco.org](http://whc.unesco.org)



**unesco**  
Konvencio pri Monda Heredaĵo